

ESPERANTISTA

REVUO POR ESPERANTO EN ĈEHOSLOVAKIO

Eldonas Esperanto-Asocio en ĈSR, Praha XIX/7-7075. — Redaktas Dr Stanislav Kamarýt.

Internaciaj esperantistaj kongresoj 1948

Signifo de niaj kongresoj estas en manifestacio de nia celado, ebleco de persona kontakto inter diversnaciaj samideanoj, publika esprimo de la interna ideo, t. e. de konvinko, ke ni ĉiuj estas morale devigataj kondukti al alinaciano laŭ la sama etiko kiel al samnacionano, ke ne ekzistas superhomoj kaj subhomoj. Julio Baghy scias pri tiu etoso de la kongresoj paroli plej impresive.

Krome oni volus, ke la kongresoj povu servi ankaŭ por enmeti sistemon en kunlaboron de la esperantistaj organizoj. Tion ili certe atingas jam pro persona kontakto de la diversnaciaj laborantoj, kiuj kunvenas. Sed ankoraŭ pli utilus, se povus el kongresaj diskutoj eliri ĝeneralaj principoj por internacia kunlaborado de la landaj Asocioj kaj de individuoj. Dro Ivo Lapenna, UEA-komitatano (el Zagreb), kritikis la Bernan kongreson, ke ĝiaj diskutoj ne temis pri tiaj principoj kaj ne estis taŭge gvidataj.

La kongreso en Malmö (nia 33-a Universala Kongreso), 31/7—7/8, klopodis plenumi ankaŭ tiun ĉi postulon. Kunvenis ĉirkaŭ 1800 kongresanoj el 33 nacioj. Tio jam per si mem signifas brillan sukceson, se oni memoras la malfacilon nuntempan pri vizoj kaj elirpermesoj en ĉiuj ŝtatoj. La salutoj de la naciaj reprezentantoj, diritaj dum la Solena Malfermo (en la granda teatrosalono de la Urba teatro) de la simplaj reprezentantoj de siaj nacioj, estas ĉiam emociigaj pro la fakto, ke estimon al la ceteraj nacioj esprimas ne diplomataj senditoj, sed simplaj partianoj de ideo, por kiu decas batali. Por Ĉeĥoslovakio salutis la kongreson prezidanto de Slovaka Esperanto-Societo s-o Pavol Rosa el Bratislava. Oficiale estis reprezentitaj registaroj Aŭstria, Ĉeĥoslova-



Nuna prezidento de Ĉeĥoslovaka Respubliko Klement Gottwald estis la 23-an de Novembro 1948 kvindekdu-jara. Finlerninte metion meblistan, fariĝis li unu el niaj ĉefaj batalantoj por ekonomiaj rajtoj de la popolo. Estante respublika prezidento li daŭre estas batalanto por transformi nian socion en socion socialistan ne laŭ vortoj sed laŭ faktoj realaj. Ni enpresas lian bildon, kiam li respondas al jubiloj de popolo lin salutanta, por esprimi ankaŭ salutojn de nia membraro.

Může se zdát zvláštní, že my, stoupenci příštího slíti národních kultur v jednu společnou kulturu (jak formou, tak obsahem), s jedním společným jazykem, jsme zároveň stoupenci rozvíti národních kultur v přítomnosti, za diktatury proletariátu. Ale není na tom nic divného. Je nutno nechat národní kultury růst a rozvíjet se, aby vydaly všechny své potenciální síly, jež jim pak umožní splynouti v jedinou kulturu s jediným společným jazykem.

Stalinova řeč na 16. kongresu Komunistické strany SSSR, 27. června 1930.

ka (nia prezidanto Adolf Malík), Finna, Itala, Nederlanda, Norvega. La listo ne estas longa. En jaro 1923 en Nürnberg estis reprezentitaj 43 registaroj, 1928 en Antwerpen 36, 1937 en Warszawa 30. Estos bezone denove insisti pri renovigo de tiu oficiala sendo de registaraj komisiitoj en pli granda nombro. Kortuŝa estis saluto fare de nepo de la Majstro Ludoviko Zamenhof. Elektita prezidanto de la kongreso estis Jan Strönnne, prezidanto de la Sveda Federacio, sekretario C. C. Goldsmith.

La ekstera kadro de la kongresaj aranĝoj estis brila. La elekto de la urbo (200.000 loĝantoj) estis tre taŭga, la oferemo de Malmöj samideanoj modela. Ni legas en raporto de F. Szilagyí, ke li mem loĝis en bela vilao de afabla esperantista familio, kie samtempe aliaj kvin gesamideanoj estis disŝutitaj en diversaj ĉambroj de la vilao. La gemastroj mem dum la kongresa semajno ne volis ĝeni siajn gastojn, pri kies bonfarto ili malavare zorgis, kaj okupis por si la kelon kiel dormlokon.

La interkonatiga vespero, la Literatura vespero (Santreuil, Naney, Merrick, Dupuis, Vasiljev, Engholm, Szilagyí), rondvojaĝoj tra la urbo, veturado sur la kanaloj, filmprezentado, vizitoj en muzeoj kaj fabrikoj, krozado en la markolo inter Svedlando kaj Danlando, kongresa balo kontentigis ĉiujn.

Somera Universitato enhavis serion de tre aŭskultindaj prelegoj de elstaraj specialistoj. La unua serio de tiaj prelegoj sub tiu ĉi titolo okazis 1925 dum la ĝeneva kongreso laŭ iniciato de Privat. Poste estis tiaj prelego-serioj ĉe diversaj kongresoj, sed sole tiuj en 1936 en Wien aperis presitaj. Ni laŭdu tre varme la decidon aperi ankaŭ la Malmö-prelegojn presite kaj ni atendu ilin kun ĝojo nepacienca.

Sed ankaŭ la diskutoj de la kongresaj laborkunvenoj en Malmö meritas laŭdon tre sinceran. Rezultoj de la diskutoj estis kunmetitaj en rezolucio, kiu devas esti speco de gvidilo por nia plua laboro. Ni represu el ĝi, kio ŝajnas al ni la plej grava kaj permesu al ni diri en krampoj niajn rimarkojn:

K o n s t a t o, ke ĉiuj konsiderindaj rezultoj de la movado por lingvo internacia estas ĝis nun atingitaj preskaŭ ekskluzive per la sindona laboro de unuopuloj sen ia ajn oficiala apogo de la registaroj kaj precipe de la internaciaj kaj interŝtataj institucioj. (Tiun konstaton ni trovas tre saĝa kaj tre grava. Estas erariga konduto por esperantistoj kaj por ne-esperantista publiko ŝajnigi, kvazaŭ iuj aŭtoritatoj apogus lingvon internacian. Tiun eraron faras precipe IALA, kaj ĝia sinteno tre malutilas al ideo de lingvo internacia precipe inter universitataj profesoroj kaj aliaj profesiaj scienculoj.)

D e c i d o j rekomendi al ĉiuj esperantistoj, ke ili intesigu sian laboron precipe inter junularo kaj instruistaro, danki al radiostacioj uzantaj Esperanton, peti registarojn serioze konsideri la eblecojn enkonduki Esperanton en seminariojn kaj lernejojn, atentigi Unuigintajn Naciojn pri la internacia lingvo ne nur kiel necesa komunikilo

de pensa interŝanĝo sed ankaŭ kiel potenca rimedo por alproksimigo de la popoloj kaj sekve por la akcelo de justa kaj daŭra mondopaco.

El la decidoj de la UEA-komitato anoncigitaj al la kongreso de prez. Malmgren ni enskribu kiel la plej gravajn: Eldonadi prelegojn de Someraj Universitatoj en serio de libroj. Raporto de E. D. Durrant pri agado ĉe UNESCO, el kiu evidentiĝas, ke UNESCO estas preta studi la kvalitojn de Esperanto kiel internacia lingvo. Presigi raporton de Prof. P. Bovet por Instituto J. J. Rousseau pri enketo pri internacia lingvo. Sendi al Landaj Asocioj raporton de la Asocio de svisaj gimnaziaj instruistoj. Rekomendi al ĉiuj landaj Asocioj iniciati aranĝon de kursoj por la instruistaro, prefere kun monsubteno de ŝtatoj. Komisiono asocion de la ĝeinstruistoj Internacia Instruista Kunlaboro kolekti faktojn rilate al instruado de Esperanto en lernejoj ĉiuspecaj, por ke tiuj faktoj povu esti disponeblaj. (Tion ni trovas tre grava, ni plurfoje spertis mankon de tiaj informoj.) Krei propagandan centron (sed ne estis trovitaj ĝisnun taŭga persono nek taŭga loko). Instigi landajn Asociojn aranĝi internaciajn klerigajn kursojn en Esperanto.

La simpla listo de tiuj deklaroj kaj decidoj atestas la laboron faritan de la kongresanoj kaj de la kongresa kaj UEA-estraro. Ili akceptu dankon kaj laŭdon.

El Ĉeĥoslovakio ĉeestis 11 kongresanoj.

Samtempe (31. VII.—3. VIII.) kunsidis la 21-a Kongreso de S. A. T. en Amsterdam, kie kunvenis ĉirkaŭ 1300 SAT-anoj. Nenio pli pravas vivantecon de nia movado ol la fakto, ke samtempe povis kunveni du kongresoj kun tiom impona nombro de kongresanoj kaj precipe nun dum tiom malfacila situacio por eksterlanda vojaĝado. En tre bone verkita protokolo pri tiu ĉi kongreso en Sennaciulo oktobra estas dirita vidmaniero de SAT-gvidantoj rilate la Neŭtralan Movadon. Pri sia celo ili diras: »klerigado, edukado, uzo de Esperanto serve de la laborista klaso«. Pri la celo de la neŭtrala movado (tio estas ankaŭ pri ni) ili diras: »divstigo de Esperanto en ĉiuj medioj kun tro ofte akcentita dandismo, flirtemo, kolektismo«. Ni ne ŝatas polemiki pri naivajoj. Ni konas nin mem same bone kiel SAT-anojn. Multaj el niaj anoj estas socialistoj multe pli sinceraj kaj multe pli dediĉintaj sin al transformo de la socio laŭ socialismaj idealoj ol kelkaj el tiuj, kiuj verkas por Sennaciulo. Krom tio ni ne kredas, ke poŝtmarkkolektanto estas fripono aŭ stultulo, kaj ke decas por socialisto moki pri li. Sed la kongreso de Amsterdam havis tre bonan nivelon kaj legi la protokolon estas por esperantisto legaĵo edifanta. La kongreso mem estas afero de SAT ekskluzive. Ĝi aŭdis, diskutis kaj aprobis raportojn de la SAT-estraro. Prezidis la kongreson 5-membra prezidantaro (Faulhaber, Jacobsen, Wels, Rosenbloom, P. Louis).

Je la 15-a de Julio 1948 havis SAT 5.210 membrojn dislokitaĵn en 39 landoj. „Bedaŭrinde nia kolektivo estas precipe Eŭropa. En Ameriko ni havas nur 146 membrojn, en Afriko nur 14. Sed en Japanio ekfloras nia varbado; ĵus

aligis 15 kamaradoj, kaj post nelonge venos sendube multege pli.»

Krom eldonado de la oficiala organo »Sennaciulo«, kiu estas tre vigle redaktata, la ĉefaj rezultoj de SAT konsistas en eldonado de libroj, preskaŭ ĉiam tre bone elektataj, ofte el sociologio kaj kun socialisma tendenco. Ankaŭ el raportoj, diritaj dum tiu ĉi kongreso, la plej gravaj koncernas la eldonan laboron.

Verkoj pretaj por eldono estas: Roza Luksemburg, La nuna stato de Evoluismo, La Kvina Evangelio.

Unua volumo de Leteroj de Zamenhof estas presata en Annemasse (Francio); ĝi havos 372 paĝojn kaj estos preta, bindita, en Septembro. Oni vendos ĝin sur bazo de 3 dolaroj. SAT-anoj pagintaj kotizon 1948 ĝuos rabaton da 20 %.

Manuskripton de Plena Vortaro Ilustrita prilaboriĝas de Waringhien, sed la libro aperos nur post relative longa tempo.

En la lasta laborkunveno oni diskutis pri loko de la kongreso 1949. Estis venintaj invitoj de kamaradoj el Plzeň kaj el Parizo. Estiĝis vigla diskuto kaj ĉar voĉdono per kartlevo montriĝis konfuza, oni voĉdonis skribe kun jena rezultato: Kolektitaj entute 442 voĉoj; el tio por Parizo 274, por Plzeň 159, senvvaloraj 5, neŭtralaj 4. Do la kongreso 1949 okazos en Parizo. Estas tre bedaŭrinde, ke ne povis ĉeesti kamarado el Plzeň por doni pluajn klarigojn.

Estu permesite diri al raportinto, ke estis por li ĝuo legi por tiu ĉi celo la Protokolaron en Sennaciulo. La SAT-kongresanoj efektive viglis en la plej bona senco de la vorto.

Tamen la estonteco de Esperanto estas en cerboj de la »neŭtraluloj«. Ili malpli dependas de teorioj kaj pli de sperto. Tial ili aspektas pli senkoloraj. Sed tio ja estas signo de ĉiu laboro: Ĝi estas farata en laborvesto. Sole la fruktoj de la laboro estas brilantaj. S. K.

Meditado super saluto el Brazilo

Estus sendube komprenebla, se mi — kiel nova kaj juna samideano — fierus tie pro ricevita karto aŭ letero el malproksima lando Brazilo. Sed mi estas nek nova nek juna samideano, do kia meditado super skriba saluto, pro kio?

Jen la kaŭzo: Versimile la plej malnova esperantisto en la mondo, sinjoro profesoro Francisco Valdomiro Lorenz sendis al mi skriban saluton. Nia Lorenz! Kaj mi — mi devis enprofundiĝi en pensojn — ricevinte lian sendaĵon.

Ĉar la nomo de tiu ĉi ŝatata verdstelulo ludas gravan rolon en la historio de nia movado. Cetere nia revuo jam publikigis interesajn artikolojn pri li en la II-a jarkolekto n-ro 6 (verkis d-ro T. Pumpr) kaj la 1-a n-ro de la III-a jarkolekto havas leteron de la brazila pioniro mem.

Permesu aldoni mallongan kompletigon: F. V. Lorenz naskiĝis 24. XII. 1872 en Zbyslav apud Čáslav. Lia „Úplná učebnice mezinárodní řeči“ (Plena lernolibro de la lingvo internacia), kiu li eldonis ĉe Hoblík en Pardubice jam 3 jarojn post la publikigo de la unua Zamenhofa libro, havis 27 paĝojn, formato 19×12 cm.

Tiu ĉi meritplena samideano estas versimile ankaŭ la unua esperantisto en Brazilo. Li vidiĝas maloftan talenton precipe sur la literatura kampo. Kun ĉiam freŝa energio kaj forta koro li dediĉis sin al Esperanto kaj lia nomo estas per oraj literoj enskribita en la historio de nia movado.

Nia historio! Jen la kialo de mia meditado.

Ĉar leginte saluton de la diligenta propagandisto kaj samgentano Lorenz mi devis ekpensi je tiuj, kiuj same fosis nian sulkon — kaj jam tute malaperis el nia movado. Dum la dua monda tragedio ni pie gardis la sanktan fajron de la Zamenhofa idealo. Certe la postmilita periodo antaŭvidas nun novajn organizadojn kaj agadon. Kvankam estas necese fari ofte strekon sub la pasintaĵoj kaj komenci sur alia bazo, tamen la novaj samideanoj, ĉiuj aktivaj elementoj, kiuj aliĝas al ni, kaj precipe la junularo, sentos neceson koni laboron de niaj pioniroj.


Redaktanto de nia revuo D-ro S. Kamarýt detale priskribis la historion de nia esperanta movado en la „Enciklopedio de Esperanto“, kie ĝi ampleksas paĝojn 89—96. entute 15 kolonojn da riĉa materialo — sed kiom ŝanĝiĝis nia laborkampo de post la jaro 1933-a, kiam aperis la Enciklopedio!

La dua mondmilito forprenis el niaj vicoj multe da fervoraj kaj kapablaj pioniroj. Ni rememoru nur la nomojn de: R. Bloch, R. Fridrich, O. Gadula, A. Horáček, J. Jeřábek, MUDr K. Marek, F. Novák, A. Nežil, J. Patera, Ing. A. Slavík, J. Vávrovský, F. Votrubec — S. Dlouhá, K. Hlaváčová, B. Keyzlarová, T. Mrázková, L. Starchová. Ĉiuj ĉi sekvis la kuraĝan batalanton Lorenz kaj en ĉefaj

landoj, kaj en Slovakio. Ĉiu el ili povus rakonti al ni pri siaj metodo kaj sukceso, pri pacienco kaj trompiĝo. Ni povus ĉerpi multan konsilon el la agado sur ilia kampo, ĉar ni iras la saman vojon.

Konsiderante tion, mi trovis necesa pensi jam pri la kompletigo de nia historia priskribo, pri kolektado de ĉiuj dokumentoj post la jaro 1933-a.

Ni ĉiuj staras ankoraŭ sufiĉe proksime de la lasta tempo, kiu nepre surprizis ofte eĉ la indiferentan publikon pro la multvaloraj sukcesoj — ni notu ekzemple la ĉiuj



Bildo de Fr. V. Lorenz laŭ foto, kiun ni ricevis de li.

tagan radio-elsendon, la sintenon de ŬRO, la favoron de lerneja aŭtoritatoj. Jen ni povas jam meti ŝtonon al historia verko — ĉar neniu scias pli bone ol ni, vivantaj pioniroj, kiel aspektis kaj kiel reale estis akceptataj ofte diversaj efektivigotaj proponoj, kiujn la tro fervoraj, sed nespertaj novuloj prezentas al ni, riproĉante nin samtempe, ke ni ne estas sufiĉe viglaj en laboro necesa!

Finiĝis jam la kongresoj kaj la Somera lernejo kaj nia kolegaro povus dum aŭtuno trovi tempon por fari tiurilatajn paŝojn — kompreneble sub gvido de nia Asocio.

Krom la nomita abundega materialo, kiun donas al ni la Enciklopedio, estos ĉefe nia gazetaro la fonto por nia laboro. Ni nomu nur — laŭtempe aperintajn: La Progreso, Bultenoj de EAĈSR, Informilo de la Ligo de katolikaj esperantistoj, Esperantista, Esperantisto Slovaka, Aŭroro (por blinduloj), Esperanto (Hradec Králové), Informilo

(Olomouc), Verda Voĉo el Doksy — krome pluj bultenoj de niaj societoj kaj — se eble — ankaŭ kelkaj rubrikoj de niaj gazetoj naciaj (Stráž severu, Česká demokracie k. a.).

Estas ĉiam bedaŭrinda, ke multaj interesaj faktoj restos nepublikigitaj kaj troviĝas nur en la memoro de la pioniroj; alia parto estas konservata ankaŭ en privataj leteroj.

Ĉiu el ni devas sin senti parto de tuto kaj helpi per siaj scio kaj povo al efektivigo de la ideo, kiun mi modeste antaŭmetas al prijuĝo de la ĉeĥoslovaka esperantistaro. Tiu ĉi kaj la vigla laboro de la slovakaj fratoj rajtigas min esperi, ke mia meditado super la brazila saluto, kiu iĝis min skribi pri ĝi, ne vaporigis kaj alportos bonan frukton.

16. 8. 1948.

Julie Šupichová.

El la „KANTOJ DE LA SKLAVO“ de Svatopluk Ĉeĥ

KANTO XIII.

<i>Griza avo, stulta sklavo sur mat' kuŝas post labor', sian rizon li englutas, laŭdajn vortojn li balbutas pri la skurĝo de l' sinjor'.</i>	<i>Lin mokante, ornamante lian bruston per moner', la sinjoro lin prezentas — sklavo sin fieras sentas — „Jen, por sklavo la model'!“</i>	<i>„Por mi sankta cel' brilanta estis gajno de l' sinjor', kaj pro tia ĉi fervoro min ornamis la sinjoro per insigno de l' favor'.</i>	<i>En okulo ros-nebulo, pro l' feliĉ' tremetis haŭt', kiam al mi sur klinitan nukon sklave mallevitan venis signo de la laŭd'!</i>
--------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------	-----------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------	--------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------	----------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------

<i>Dankas koro pro l' honoro de neforgesebla hor', kiam rajtis mi ĝis koto klini kapon, kaj de boto kotmakulon leki for!</i>	<i>Dia Sorto, ke ĝis morto servu mi kiel model'! Kantu himnojn, Lin laŭdante kaj samtempe malbenante ĉiun provon de rebel'!</i>	<i>Kia ĝojo, lia vojo ke konduku trans la lok', kie sub ter' mia korpo putros iam post la morto, tie paŝu lia bot'!“</i>
----------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------	-------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------	------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------

El la ĉefia Erinazzo.

KRONIKO ENLANDA

Rememorigante la 30-an datrevenon de restarigo de nia respubliko la 28-an de Oktobro kaj 31-an datrevenon de la rusa Oktobra Revolucio la 7-an de Novembro ni enpresas hodiaŭ kiel unuan alineon en nia Kroniko enlanda sekvajn vortojn de nia ministro de instruado Prof. Dr Zdeněk Nejedlý, kaj rekomendas ilin por la atenta legado precipe al niaj eksterlandaj legantoj:

La rusa revolucio ludas grandan rolon en la batalo por politika libereco de la ĉeĥa nacio. Jam la unua rusa revolucio en la jaro 1905 frapis kiel fulmo en la relative trankvilan vivon inter ĉeĥoj. »For la reakcion! La rusa revolucio vivu!« tondris tiam sur la stratoj de Praha, kie demonstraciis dek miloj de la ĉeĥa popolo. Venis poste la februara revolucio kaj ĉefe la Oktobra en 1917 kaj tiu trovis inter ĉeĥoj eĥon ankoraŭ pli grandan. La batalo de la nacio akceptas jam ankaŭ revoluciajn formojn. En Januaro 1918 ĝenerala striko de laboristoj kaj metiistoj. En Februaro 1918 eksplodas ribelo gvidata de ĉeĥaj maristoj en la kvina divizio de la habsburga marŝiparo. . . Kaj en Majo la konata ribelo de la ĉeĥa sepa regimento. Tiel la granda rusa Oktobro rekte tramordas la habsburgan imperion kaj havas la plej grandan meriton pri tio, ke venis la Oktobro ĉeĥoslovaka kaj estis kreita la ĉeĥoslovaka respubliko.

Lenin kaj esperantismo. Dezirante ekscii, kiel la sovetoj traktas nian movadon, mi intervjuis en 1920 D-ron Hillerson, la tiaman estron de la So-

vetia Misio en Praha. Ĉe tiu okazo mi praktike uzis Esperanton; la rolon de interpretanto prenis sur sin samideano Simon Elioviĉ, naskita en Ĥarkov.

D-ro Hillerson akceptis nin tre kompleze. »Mi estas feliĉa,« li diris interalie, »povante doni al vi informojn pli favorajn, ol kiajn vi eble atendas. Mi mem fieras esti intima amiko de k-do Lenin, kun kiu mi pli ol unufoje diskutis pri la interlingvistika problemo. Vladimír Iliĉ persone ŝatas Esperanton. Li nomas ĝin »proletara latino« kaj esperas, ke ĝi helpos pro sia ideala facileco efike akceli la interproksimiĝon de la tutmonda laboristaro.«

La vortojn de D-ro Hillerson mi ne kapablas — post tempo tiel longa — citi laŭlitere; tamen mi kuraĝas aserti, ke mia raporto almenaŭ laŭsence estas nepre fidela. (Miloš Lukáš).

Esperanta traduko de kompleta teksto de la Ĉeĥoslovaka Konstitucio aperis eldonita de nova fako ĉe la Asocio, fondita laŭ § 3 j, »Instituto de Esperanto-Servo«. La tradukon verkis J. Mařík, kunlaboris Dr T. Pumpr kaj R. Hromáda. Ĝi estas unua verko en serio de broŝuroj pri polit. kaj ekonomiaj faktoj de nia respubliko, kiun la Instituto eldonados kun oficiala monsubteno. La broŝuro estas destinita por informi fremdlandon pri la legislativa faro de la Majo 1948. Niaj legantoj, kiuj volos sendi la broŝuron al siaj korespondantoj en fremdlando, ricevos ĝin senpage laŭ mendo ĉe nia kutima adreso. Estos la plej agrabla devo

de nia legantaro informi tiamaniere siajn amikojn kaj akiri ilian dankemon pro sendo de bela kaj instrua libro. — Krome la Instituto regule eldonas monatan bulleton »**Esperanto-Servo**«, Aktuala Bulteno de Praha« redaktatan de sia prezidanto Adolf Malik. La bulteno enhavas raportojn pri aktualaj okazintaĵoj en nia respubliko. La oktobra numero jam aperis. Ĉeĥoj kaj slovakoj dissendu ĝin al viaj korespondantoj! Ĝi ne estas dediĉita por esti konservata en nia lando, sed por esti legata ekster niaj landlimoj. Ĝi certe tre utilos por doni fidindajn sciigojn al ĉiu, kiu ĝin legos.

Instituto de Modernaj Lingvoj (Ústav moderních řečí) en Praha estis transprenita de Centra Estraro de Sindikatoj (ÚRO) kaj tial lingvajn kursojn, kiujn en pasintaj jaroj aranĝis Labor-lernejoj, okazigas ĝi. La Instituto jam presigis flugfoliojn pri siaj kursoj, inter kiuj estas ankaŭ Esperanto. En la kursoj en Praha instruas la instruistoj de la lastjaraj kursoj en la Laborlernejoj. La Asocion tie reprezentas s-o Ant. Slanina.

Lingva Komisiono de la Asocio estis kreita laŭ decido de la Komitato la 4-an de Majo. Ĝi funkcias kiel Ĉeĥo-slovaka Konsilanta Komitato de la Akademio de Esperanto.

Membroj de la Komisiono estas: Ĉs. membroj de la Akademio de Esperanto, lektoroj de Esperanto, membroj de Ekzamenaj Komisionoj, aŭtoroj de Esperanto-lerneolibroj kaj vortaroj, ĉs. esp. verkistoj kaj redaktoroj de esp. gazetoj kaj aliaj lingve spertaj ĉs. esperantistoj, kiujn la Komisiono akceptas.

La Komisiono:

1. prizorgas kontakton de la Asocio kun Akademio de E., lektoroj de E., Somera Esperanto-Lernejo kaj aliaj institucioj, kiuj plenumas instruadon de Esp-o aŭ studadon pri ĝi;

2. kunlaboras pri eldonado de esperantaj verkoj (originalaj, tradukitaj, lernolibroj, vortaroj);

3. aranĝas prelegojn pri lingvaj problemoj de Esp-o, ĝia literaturo k. s.;

4. aranĝas fakajn specialistajn kursojn de Esperanto (ankaŭ korespondajn), kontrolas kompetente kursojn, aranĝatajn de la kluboj kaj aliaj esperantistaj kaj nesesperantistaj institucioj, faras statistikon de la kursoj;

5. fondas kaj konservas sliparon de aprobitaj Esperanto-instruistoj kaj rekomendas ilin por gvido de kursoj;

6. estas konsultejo pri lingvaj demandoj;

7. plenumas ankaŭ aliajn funkciojn pri lingva kaj instrua flanko de Esperanto.

La nomitajn funkciojn plenumas referantoj, membroj de la Komisiono.

Direktoro de la Komisiono estas PhDr Augustin Pitlík, lektoro de Esperanto ĉe Altlernejo de specialaj sciencoj en Praha II, Křemencová 21, al kiu estu sendataj ĉiuj koncernaj korespondaĵoj sub adreso de Asocio.

23-jara brita maroficiro de radioservo Jan Mc Laren el Skotlando gratulas al Ĉeĥoslovakio, ke ĝi posedas la plej aŭdeblan esperantan stacion en la mondo kaj ankaŭ la plej klaran por la aŭskultanto. Li aŭdas la esperantajn elsendojn de Praha ankaŭ apud la brazila bordo (lastfoje apud Santos) tre bone per ondo 31,41 m. La elsendojn sur ondo 49,92 m li bone aŭdas ĝis Acoroj, veturante en Sud-Amerikon. Poste la ondo malfortiĝas kaj estas repuŝata per la usonaj kaj kanadaj. La ondon 25,51 m li ne povis kapti, ĉar tiuhore estis varma mateno sur la Okcidenta Atlantiko, malfavora tempo por aŭskulti ĝin. (jm)

Junulara fako de EAĈSR estis fondita. Ĝia komitato (adreso: Junulara sekcio EAĈSR, Praha XIX/7, poŝt. přihrádka 7075) invitis junajn ĝesamideanojn al aliĝo. Postulu informojn aldonante poŝtmarkon por respondo.

Skriba kurso, gvidata de E. K. en Hradec Králové, havas dum la pasinta jaro 200 partoprenintojn en lokoj de la tuta respubliko. Ĝi specialiĝis por propagando inter fervojistoj. La Klubo konstataas ĝoje, ke tre multaj, fininte sukcese la kurson, sekvis inviton aliĝi al la Asocio.

Koncert-vojaĝo de sinjorino Marguerite Santreuil, membrino de opero de Théâtre National du Palais de Chaillot en Parizo, konata el franca radio kaj kantinta en la kongresoj en Bern kaj Malmö, komenciĝis en Brno la 20-an de Septembro, kiam ŝi estis salutita de tieaj samideanoj. La 21-an okazis ŝia koncerto en hotelo Pasáz; pianoakompanis eminenta komponisto Vil. Scheiber. La 23-an estis koncerto en Olomouc, la 24-an en Prostějov kun akompano de s-ino Havránková. La 26-an ŝi kantis en Košice, la 28-an en Svit, la 29-an en Ostrava, la 2-an de Oktobro en Hradec Králové, la 5-an de Oktobro en Ústí n. L., la 6-an en Plzeň, la 8-an en Tábor. La 9-an ŝi kantis en Radio-Praha (mallongaj ondoj), la 10-an forveturis la artistino el Praha en Francion. La tekstoj de la kantoj estis parte francaj, parte esperantaj, kiel vidigas la programo, prezentita en ĉiuj koncertoj:

Raynaldo Hahn: Paysage — Ho miaj versoj — El malliberejo.

Tiarko Richepin: L'Île rose.

Ch. Koechlin: Si tu le veux.

Henri Duparc: Chanson triste — Elegio — Antaŭa vivo — Invito al vojaĝo.

G. Charpentier: Louise.

Massenet: Adieu notre petite table.

B. Smetana: Lulkanto el „La kiso“.

André Coquin: Mi estas ĝaja papilio.

G. Puccini: Sur la mer calme.

La voĉo kaj precipe la prezentmaniero tre plaĉis al publiko, kiu ĉie vizitis la koncertojn de franca samideanino en deca nombro, ie estis koncertsalono pleneĝa. Aperis laŭdaj kritikoj en pluraj ĵurnaloj, ni legis tiajn en Nová politika kaj en Lidová obroda. Oni laŭdis precipe kantoteknikon, delikatan gracion kaj kulturon de la voĉo. — La koncerto signifis ĉie tre bonan kaj nealtrudeman propagandon. La artistinon invitis kaj la vojaĝon aranĝis nia Esperantista societo en Olomouc, kiu akceptu dankon pro la iniciato kaj gratulon pro la bona aranĝo. Kaj samideanino Santreuil akceptu dankon pro sia fervoro, kun kia ŝi dediĉas sian arton al propagando de franca muziko kaj de nia lingvo.

Regiona laborkunsido de la VII-a regiono en Teplice la 2—3-an de Oktobro 1948 kunvenigis ĉirkaŭ 50 personojn, plejparte el Teplice, krome el Ústí n. L., Podmokly-Děčín, Chomutov, Kladno, Praha, Karlovy Vary k. a. Prezidis Oto Skleněka, protokolis A. Košťál. Por la Centra Komitato ĉeestis vicprezidanto Rudolf Hromada, J. Dušek (Ústí n. L.) estis elektita denove regiona peranto por la VII-a regiono. Distriktaĵ perantoj estis elektitaj: A. Košťál (Teplice), Chel (Děčín), Hlaváček (Ústí n. L.), Mucha (Chomutov). La regiono entreprenos dum decembro varban kampanjon por januaraĵ kursoj en ĉiuj gravaj lokoj en la regiono. S-o Motejzík (Ústí n. L.) estis komisiita esplori, ĉu estus eble krei en la regiono amatoran teatro-grupon. Estis prezentitaj raportoj pri kunlaboro kun Radio, pri utileco informi fremdlandon per individua korespondado, estis akcentita devo de ĉiu membro bone ellerni la lingvon. La kluboj de la regiono daŭriĝos la belan kutimon reciproke sin vizitadi. Estas preparataj turistaj prospektoj pri Norda Bohemio. La kunveno esprimis postulon, ke rekomendo por vizito de la Universala Kongreso estu venontjare donita al aliaj personoj, ne al la samaj, kiuj jam vizitis Bern aŭ Malmö.

Esperantista kunveno sur monto Sněžka. La 19-an de septembro kunvenis sur supro de la plej alta monto bohemia Sněžka, kuŝanta sur limo de Polio, esperantistoj polaj el Jelenia Góra kun esperantistoj ĉeĥoslovakaj el Liberec. La polojn, inter kiuj estis ankaŭ Jerzy Michalik, sekret. de EK Gdynia, gvidis prof. Jakob Garbar, la ĉeĥojn reprezentis direktoro Stanislav Knižek. La samideanoj pasigis kelkajn horojn en agrabla kaj utila interparolo, kiuj signifos espereble komencon de daŭraj amikaj rilatoj.

En Biblioteko de Komerca ĉambro en Olomouc aperis kvina volumo kun esperantlingva resumo. Ĝi estas „Akvoekonomiaj problemoj de la lando Moravio-Silezio“. 56 paĝoj, 16×19 cm. La resumoj estas en la rusa, angla, franca kaj Esperanto po unu paĝo. Prezo 27 Kčs plus afranko 2,50 Kčs.



La bildo montras aktorojn, kiuj ludis en radiosceno „Fantomo en la kastelo“. Starantaj: Frant. Landsman, Miloš Nývlt, Jan Valeš, Antonín Slanina, Václav Lorenz, inspiciento Bohumil Semerák, Antonín Klimeš, ĉefreĝisoro Josef Bezdíček. Sidantaj: Václav Piskáček, Bedřich Bobek, Zdenka Švabíková-Kožíková, Karel Höger, Ludmila Klimešová, Jaroslava Vacková. — Sur la dua bildo: Ĉefreĝisoro en Radio-Praha Josef Bezdíček kun asistanto kaj miksisto dum prezentado de la Fantomo en la kastelo.

Resono de esperantlingvaj disaŭdigoj el ĉeĥoslovakaj stacioj estas daŭre tre kontentiga. Al la jam kutimaj programoj aliĝis Artoprogramoj, disaŭdigaĵoj sub titolo de Verda stacio ĉiun unuan lundon de la monato je la 23,00 ĝis 23,30 horo de la mezeŭropa tempo per stacioj Praha II, Morava, České Budějovice. Gvidas tiujn programojn Ant. Slanina tre ofere kaj klopodante pri bona nivelo kaj diverseco de la programoj.

La 6-an de Septembro prezentis la Verda Stacio radio-filmon „Voĉoj de ĉefaj poetoj“ el la jarcento. Vira kaj virina voĉoj alternante deklamis po unu poemon de Neruda, Čech, Vrchlický, Sládek, Sova, Wolker, Nezval, Halas. Precipe la deklamo de Montara balado de Neruda estis tre kortuŝa. Apartan laŭdon meritas enkondukaĵoj klarigaj kaj informaj paroloj inter la poemoj.

La 4-an de Oktobro estis prezentita „Bendo de komikecaĵoj temoj“. Ĝi komenciĝis per respondoj al ricevitaj leteroj, iam estis la aludoj tre spritaj, kaj ĝenerale la tuta aranĝo meritas laŭdan mención kiel sprite kunmetita tuto. El la programeroj mi aparte menciis prezenton de teksto el K. Poláček „Skribado de leteroj“ kaj melodion post la „Edzperanto“.

La 1-an de Novembro estis prezentita parto el la „Vintra fabelo“ de Shakespeare kun dialogo pri problemoj, kiel okazis, ke Shakespeare parolas pri Bohemio kiel lando apudmara. La poemo mem (en traduko de Pumpr) transdonis poezion de la originalo tre varme, la dialogo kaj la enkonduko adaptitaj de Ant. Slanina sukcesis tre interesigi la aŭskultanton kaj kredigi al li, ke temis pri slavaj ne pri siciliaj princoj. Reĝisoro Dalibor Chalupa.

LINGVO

Traduko de la 18-a teksto.

Finiĝas¹ la terura milito, en² kiu oni provis³ detru⁴ kaj disbati⁵ nian ŝtaton, apartigi⁷ la ĉeĥojn de la slovakoj⁸ kaj pereigi⁹ nian nacian vivon. Tiu fia⁹ atenco ne sukcesis. El tiu ĉi milito ni eliros denove¹⁰ venk(int)aj, unuigitaj¹¹ kaj liberaj. Sed¹² ni devas lerni per¹³ la eraroj kaj mankoj de la pasinteco¹⁴ kaj ankaŭ¹⁵ per niaj novaj sukcesoj kaj venkoj. Nia nova domo devas esti rekonstruita¹⁶ politike kaj sociale, kun nova enhavo¹⁷, novaj homoj kaj ofte eĉ¹⁸ kun novaj institucioj. Havu la kredon je¹⁹ tiu nova vivo kaj

Direkcio de fervojoj en Hradec Králové per aparta cirkulero rekomendis al fervojistoj partopreni en Esperanto-kursoj por ili aranĝataj kaj informis la Klubon en Hradec Králové, ke la kursoj povos okazi en ĉiu pli grava stacio. La kursoj estos oficialaj, pago al instruanto kaj ceteraj elspezoj estos kovrataj el fontoj de la fervojdirekcio. En Kyšperk kurso jam funkcias por 50 fervojistoj. Samideanoj, kapablaj kaj emaj instrui en fervojstacioj Josefov, Jičín, Nymburk, Hradec Králové, Mladá Boleslav, Turnov, Trutnov, Liberec estas vokataj anonci sin. Turnu vin al E. K. Kradec Králové, kiu transprenis taskon labori en tiu ĉi sfero. — Similajn cirkulerojn eldonis jam ankaŭ fervojdirekcioj en Brno kaj Olomouc.

Kursoj en fabrikaj kulturkluboj funkcias jam ĉe Walter en Jinonice (s-o Dryák), ASAP en Mladá Boleslav (s-o Šolc), Škoda en Plzeň (s-o Pelcman). Ni tre ŝatas tiun ĉi iniciaton kaj salutas la kursanojn same sincere kiel la kursgvidantojn.

Nombro de la Asociaj membroj, pagintaj kotizon ĝis 30-an de Septembro, estas 2897. Sumo de enkasigitaj kotizoj estas 163.000 Kčs. Tio estas ciferoj ĝis nun neniam atingitaj en nia movado. Precipe la lokaj laborantoj akceptu dankon.

Regiona peranto por la XIX-a regiono estas s-o Ota Erben, kapitano, Lenin-str. 27, Opava.

havu vi ĉiuj la kuraĝon batalatingi²⁰ ĝin vir(ec)e, sentime kaj honeste.

La unua vojo²¹ al tio²² estas, ke²³ en ĉi tiu tempo de renverso kaj grandaj ŝanĝoj²⁴ vi ne falu en malordon kaj ĥaoso, ne komencu interkvereli²⁵ parti(em)je kaj ne venu do tien, kien jam nun venis iuj el la ceteraj nacioj. En la decidaj momentoj vi devas havi kuraĝon por komenci la konstruadon²⁶ de via ŝtato sentime²⁷ kaj honeste, objektivite kaj nepartie²⁸ laŭ la novaj bezonoj, kiujn sekvigis²⁹ la dua mondmilito. — Dro E. B. en sia lasta radioparolado³⁰ el Londono la 16 Februaro 1945.

Poznámky:

¹ Nikoli: oni finiĝas la... milito. La milito finiĝas = finiĝas la milito; ² dum; ³ oni faris provon. Eksperimento je pokus za účelem výzkumným, zvláště v přírodních vědách; ⁴ renversi, fiaosigi, ruinigi; ⁵ dispecigi = rozkouskovat, dissplit(igi) = roztržít; jména národů se piší v malým písmenem počátečním; ⁷ deŝiri = odtrhnouti, utrhnouti; izoli = izolovati; dividi = spíše rozdělit; ⁸ ne- niigi; ⁹ malnobla, abomena, krima. Sentaŭga = kio ne taŭgas; ¹⁰ ree; ¹¹ unuigintaj. Nikoli: ni eliros venkontaj, unuigotaj; v době, kiam ni eliros, budeme již venkontaj, unuigotaj, nebudeme teprve před vítězstvím, před sjednocením; ¹² Sed musí býti na začátku věty; ¹³ též lerni de, laŭ, el; ¹⁴ la pasinta tempo, estinteco; ¹⁵ same kiel; ¹⁶ alikonstruita, transformita. Nikoli rekonstruita. Po válce dŭm musí býti přestavěn (-ita), nikoli býti teprve před přestavbou (-ota); ¹⁷ nikoli; panelo = náplň ve dveřích, v ostění; ¹⁸ kelkiam, diversloke; ¹⁹ al, pri, též fidon; ²⁰ probojovat se k ĉemu = bojem dosáhnouti, získati batale akiri, batale atingi. Trabatali je vhodnější ve větách jako — trabatali al si vojon en neĝo, en homamaso; ²¹ nikoli: vojaĝo = cesta ve smyslu cestování; ²² al tiu celo; ²³ nikoli: por ke; La vojo estas: „ne falu“, nikoli „por ne falu“; ²⁴ aliformiĝoj; nikoli: modifoj = změny, které pozmení a nedotkne se podstaty; ²⁵ malpaci reciproke; ²⁶ též: kuraĝon por komenci konstrui vian ŝtaton. V jednom překladu byla zajímavá věta s třemi infinitivy: vi devas kuraĝi komenci konstrui vian ŝtaton; ²⁷ kuraĝe; ²⁸ neegoisme kaj nepartieme; ²⁹ aperigis, alportis, elvokis. Dle PV: elvoki ridon, konfuzon, skandalon, intereson. Též: vek; dle PV vek; simpatian, disputon, malpacobn; ³⁰ projev diskurso; prohlášení deklaro.

Tentokrátě došlo dokonce 52 překladů. Práci zaslali: Bayer Jar., Bratislava; MUDr Černý Jos., Litoměřice; Čížek Jar., Praha; Doupal Jan, Orlová; Forejtová Zdenka, Teplice; Frantl Ant., Opava; Grich Eugen, Poproč; Haering J. V., Praha; Hopf Jos., Nové Sedlo; Hřel Zdeněk, Praha; Jakoubě Jakub, V. Hamry; Kaminský Rud., Ostrava X.; Kavková Lud., Přerov; Kithier, Bratislava; Ing. Kochman Jos., Praha; Košutek Jos., Mor. Nová Ves; Kotrba Václav, Teplice; Kožušník Jan, Kunčice n. O.; Kuba Fr., Olomouc; Dubová Anďela, Mikulovice; pastro Macek Alfred, Pulgáry; Malinský Jos., Teplice; Milek Frant., Karlovy Vary; Mir V. E., Děčín; Novotný Vlad., České Budějovice; Odehnal Jos., Zlín; Ochoťný Fr., Kladno-Rozdělou; Rejthárková Lidm., Hradec Kr.; Růžička Václav, Podmokly; JUDr. Sahánek Oldřich, Praha; Santholzer Bedř., Praha; Ing. Shánělec Jan, Tábor; Skleněčka O., Teplice; Skleněková Bož., Teplice; Slavík M., Nový Bydžov; Sluka V., Hrubý Rohozec; Schöblová Ant., Beroun; Schwarz Fr., Sezimovo Ústí; Široká M., Kaceřov; Šlupák Čeněk, Praha; Ing. Tuháček Em., Olomouc; Valešová Slávka, Turnov; Valniček Stan., Nivnice; MUDr Vaněk Fr., Nová Role; Vít K., Zlín; Vltavská M., Hranice; Wadasová M., Olomouc; Weinerová Bož., Hradec Kr.; Závodný Č., Opava; Zdvihal Jan, Týnec n. Sáz.; Zimek Stan., Přerov; Žák Jar., Střelice. Z nejlepších prací byly tentokrátě vylosovány dvě: knižní odměnu posíláme p. Jakoubě a sl. uč. Kavkové.

Hm.

Jazykové odpovědi.

Postuli. Český význam tohoto slovesa je: požadovati, vyžadovati, více méně náročně a důrazně. Postuli sian parton de heredaĝo = požadovati, vyžadovati svůj díl dědictví. Postuli paĝon pro sia laboro = požadovati plat za svou práci. Tiu demando postulas pripenson = ta otázka vyžaduje uvážení. Tiu verko postulis de ni trijaran laboron = to dílo vyžádalo si naši tříleté práce. Postulo = požadavek: Esperanto bone kontentigas ĉiujn postulojn, kiuj povas esti farataj al lingvo internacia. Esperanto dobře vyhovuje všem požadavkům, které mohou býti kladeny na jazyk mezinárodní.

České žadati = peti. Můj přítel mne žadal, požádal = mia amiko petis min (nikoli: postulis min). Nebo: mia amiko deziris, ke mi... Žádám vás za sdělení — mi petas vin pri informo, mi deziras de vi informon, mi deziras, ke vi sendu al mi informon.

Ĝis nun = dosud, (od nějaké doby) až do teď. Až nyní = nur nun (ne pli frue ol nun). Ĝis = až k, až na, až do: de la kapo ĝis la piedoj = od hlavy až k nohám. De mateno ĝis vespero od rána (až) do večera. Mi restos ĝis morgaŭ = zůstanu do zítřka. Priĵdu aŭ zitra = mi venos nur morgaŭ. Mi ne venos ĝis morgaŭ = nepřijdu do zítřka, nepřijdu před zítřkem.

Cent homoj, mil partoprenantoj. Nikoli: mil da, cent da homoj. Po základních číslovkách neklade se předložka. Unu homo, tri homoj, kvin knaboj, dek du ovoj, dudek kvar horoj. Pouze po substantivních předložkách jest klásti předložku tak jako po jiných podstatných jménech: milionoj da homoj, centoj el tiuj arboj a pod.

Na další došlé dotazy odpovíme přistě.

Hm.

Traduko de la 19-a teksto

Ŝi ne komprenis, kio fakte okazis en ŝi. La epizodo³ kun Andreo — (tio) estas ja ridinda.⁴ Kiom da tiaj aferoj oni forgesas⁵ de unu plenluno al la alia.⁶ La juna slovako ja iom spitis,⁷ kiam li devis foriri, poste petis kaj ploris, kaj fine li submetiĝis⁸ kun premitaj lipoj,⁹ kun sinteno¹⁰ iom enigma, jam vidiganta¹¹ ian intencon. — Jiřina¹² staris apude,¹³ kiam li pakis sian havaĵeton¹⁴ kaj ŝiaj okuloj akompanis¹⁵ lin el la pordego, kaj nur poste ŝi ekkonsciis kun certa surprizo, ke gravas por ŝi iom lin turmenti. Ŝi ankaŭ ne povis malebliĝi, ke revenadu al ŝi,¹⁶ bonvene aŭ ne, iuj el la rememoroj pri la tiama bala nokto. Pri¹⁷ la stranga decidiĝo, kiu trapenetris ŝin en la lumplena salono¹⁸ meze de danĉritmo — kvankam komence ŝi tiam tute ne pensis pri Andreo — pri¹⁷ la stranga ekstazo¹⁹ instiganta²⁰ ŝin, ke ŝi rompu²¹ la egalpezon tiodis mallirman, kaj pri la fiero kompto,²² kiam ŝi ekvidis la tragikan²³ maskon de Jan Simon... Sian fianĉon ŝi tute ignoris²⁴ kaj eble ŝi eĉ estus vango-fragpinta lin, sur la supro de la ŝtuparo,²⁵ kiam li tiel memkompreneble sin pretigi²⁶ veturi kun ŝi hejmen. Kiel li ofendiĝis²⁷ kaj kiel malsaĝe²⁸ li ridetis, kiam ŝi diris al li, ke ŝi ne plu volas²⁹ lin vidi! Ho, tiu vanteco de viro! Ĉu povus ja iu rifuzi lin, inĝenieron Vojtěch Vydra, filon de la deputito Vydra el Orechov... (J. Č., Limo de ombro.)

Poznámky:

¹ verdire, vere, propre, efektive; ² pri ŝi, al ŝi; ³ okazintaĝo, aventuro; ⁴ ridinda afero; ⁵ estas forgesitaĵi, forgesiĝas; ⁶ sekvanta; ⁷ kontraŭstaris, obstin(et)is; ⁸ rezigni; ⁹ kun lipoj kunpremitaj, premfermitaj; ¹⁰ mieno, pozono; ¹¹ malkaŝanta, antaŭdiranta; ¹² Georgino; ¹³ ĉe li, apud li; ¹⁴ siajn aĵojn, siajn du-tri posedaĵerojn; ¹⁵ ŝi okule (rigarde) akompanis lin, okulakompanis; ¹⁶ ŝi ankaŭ ne povis, ne kapablis defendi sin kontraŭ la revenado, bonvena aŭ ne, de iuj el...; ŝi ne povis malhelpi; ¹⁷ Opakujeme „pri“, aby byla jasnější souvislost následujících vět se slovem „vzpomínky“; ¹⁸ salo = súll; ¹⁹ raviĝo; ²⁰ kiu tenis ŝin, logis ŝin; ²¹ renversu; ²² kunsento; ²³ tragedian; ²⁴ ŝi tute ne atentis, ne rigardis; ²⁵ supre sur la ŝtuparo; ²⁶ sin preparis; ²⁷ nikoli: fierŝvelis, fanfarone grimacis, nafoukl se asi nikoli pýchou, když byl odbyt, nýbrž se spíše nafoukl uražen; ²⁸ malsprite, stulte, ²⁹ ke ŝi jam ne volas.

Dostali jsme celkem 28 překladů. Zaslali je: Belda E., Tanvald-Šumburk; Čížek Jar., Praha; Doupal Jan, Orlová-Poruba; Forejtová Zdenka, Teplice; Hladík A., Kostelec n. L.; Esperantista-Klubo Hradec Králové; Kořínek Jiří, Brno; Košutek Josef, Mor. Nová Ves; Kotrba V., Teplice; Kuba Fr., Olomouc; Macek Alfr., Pulgáry; Esp.-Klubo Pardubice (Nálevka Fr.); Poláček Jos., Trávníč; Růžička V., Podmokly; Skleněčka O., Teplice; Skleněková B., Teplice; Sládek Jos., Teplice; Široká M., Kaceřov; Schöblová Ant., Beroun; Schwarz Fr., Sezimovo Ústí; Tichota Petr, K. Vary; Ing. Tuháček Em., Olomouc; Valešová Sl., Turnov; MUDr Vaněk

Fr., Nová Role; Vltavská M., Hranice; Voda Jar., Týn u Třebíče; Weinerová Bož., Hradec Králové; Zdvihal Jan, Týnec n. S. — Odměna za nejlepší práci byla losem přičtena p. Kořínkovi, Brno.

Hm.

FERVOJISTAJ TERMINOJ

Ni prenis kelkajn terminojn el „Morto de trajno“ kaj tradukigis ilin de s-o J. Rebiček, kiu dum multaj jaroj laboras pri fervoja terminologio. Ni donas ilin sube laŭ la ĉeĥa aboco, aldoninte unu vorton ne trovitan en la nomita libro.

NI LEGIS

Deveno kaj vivo de la lingvo internacia Esperanto estas traktato de Petro Stojan publikigata po partoj en „Flandra Esperantisto“. Enestas kelkaj novaj observoj, konstatoj kaj teorioj. Stojan akcentas la intuician solvon de multaj problemoj de lingvo artefarita fare de Zamenhof kaj gravan influon de slavaj lingvoj al li. Ni citu el aprila numero: „Ke E. baziĝis sur franca, germana, angla, greko-latina kaj iomete sur slava radikaro — pri tio oni multe skribis; sed la intima slava influo en la strukturo restas preskaŭ nekonata, pro la fakto, ke la okc.-eŭropaj eminentuloj ne scias slavajn lingvojn, nome la gramatikistoj: Cart, Fructier, Aymonier, Grosjean-Maupin, Cox, Bailey, Esselin, Lippman k. a. sin turnis en malvasta spaco de siaj lingvoj, kies tutmondan idean valoron ili trograndigis.

Kaŝata antipatio de la civilizitaj eŭropanoj kontraŭ la orientuloj ankaŭ ludis sian decidigan rolon, malgraŭ la teoria respekto kaj nur fraza amo interpopola. El tio sekvis, en jaroj 1906—1916, kvazaŭ sabotado kaj bojkotado de la Zamenhofaj lingvo-ideoj, kiuj forte malplaĉis al la admirantoj de la Racine-stilo.

Rusa lingvo prezidis en la eduko kaj lerneja studado de Zamenhof en Belostoko, Varsovio kaj Moskvo. La scio de tiu lingvo do ja necesas por seriozaj studentoj, kiuj celas akiri sendependan komprenon pri la deveno kaj intima konstruo de la lingvo. Ankoraŭ pli necesas tiu scio por vidi la lingvo-evoluon al ĝusta direkto, indikita de Zamenhof. La mizero de la nuna lingvostato, preskaŭ degenerado, rezultas grandparte el tio, ke dum lastaj 30 jaroj la sorto de Esperanto estis en manoj de ambiculoj, al kiuj mankis larĝa lingvo-kompreno. Se la korpo (radikaro, literaro) de E. estas okc.-eŭropa, ĝia animo (strukturo, ideesprimo) restas orient-eŭropa, eŭrazia, slava. Por ilia spirita avantaĝo la slavoj restis barbaraj loĝantoj en Eŭropo. Al ili apartenas la merito konservi praaajn formojn, arkaikajn vortojn, kaj antikvajn pensmanierojn. Slava, latva, lituva — jen tri lastaj lingvo-fideluloj, heredintoj de la primitiva hind-eŭropa idiomo, kiu naskiĝis en Vindujo.“ ...

„La korelativa tabelo devenas ne el la greka — kiel imagis angla gramatikisto — sed el la slava, kie ĝi estas ankoraŭ pli riĉa: koj, toj, nikakoj — kogda, togda, nikogda — kamo, tamo, nikamo — kad, tak, nikad ktp.“

„Multaj strangaj kunmetaĵoj el la primitiva E. estas nur mallerte tradukitaj slavaj vortoj: Centjaro (jarcento), sendito (ambasadoro), landaĵo (lokestraro), blankaĵo (albumeno), dezertulo (ermito), surbordo (kajo), enveturejo (hotelo), orajisto (juvelisto), sciigaĵo (informa bulteno) k. m. a.“

„Principe la adoptita radikaro baziĝis sur pluraj naciaj lingvoj. Sed praktike enŝoviĝis formoj solnaciaj aŭ mal-larĝe naciaj malgraŭ formoj internaciaj, komunaj por multaj lingvoj. Bird estas malpli internacia ol avi, hund ol dog, kyn; ŝton ol ston, sten; ŝultr ol epol; ĉeval ol kaval aŭ kabal; ŝuld ol deb; plaĉ ol plez. En tiaj kazoj Zamenhof verŝajne konscie kaj intence adoptis la angla-germanajn radikojn por ne fari sian lingvon tro romana-latina; pro la sama „justeca“ motivo li aldonis (ne necese) iom da slavaj radikoj.“

Ni citas tiujn observojn, ĉar ili estas tre instruaj por pripensi la teknikon, laŭ kiu artefarita lingvo estas konstruata, kaj vidigi la problemojn de la realigo. Kaj por akcenti la genian intuicion de Zamenhof, kiu solvis multajn problemojn per metodo ĝis nun ne esplorita.

dveŭni závora pordoriglilo

jaŕmo relparo (Ř)

kolej (dva pásy kolejnic s příslušnými pražci, upevňovadly, ale bez šterku) trako

kolejnicové podkladnice relseĝoj

ložiskové pouzdro laĝroskatolo

podvozek boĝio

pražce ŝpaloj

spřáhlo kuplilo

srdcovka frogo

šterkovati balastadi

výhybka traforko.

Lernejoj en Finnlando. Ni represas el Esperanta Finnlando (majo): La instruisto de popola lernejo de Alajoki apud Hämeenlinna, s-ro Lauri Lehtola, ricevis la permeson instrui Esperanton kiel devigan fakon en la du superaj klasoj de sia lernejo.

Kaŭze de tio ni turnis nin al la Administracio de publika instruado (tutlanda administracio, sub la instrua ministerio).

La ĉefdirektoro Y. Ruutu diris i. a.: La problemoj pri enkonduko de Esperanto kiel universala lingvo estas tre interesa. Tio donus multan utilon en malgrandaj landoj, kiel Finnlando. Anstataŭ tri aŭ kvar fremdaj lingvoj oni bezonus instrui nur unu, kaj lecionoj liberigis por aliaj gravaj fakoj. La solvo tamen dependas multe de la sinteno de la grandaj potencoj, precipe la anglosaksa mondo kaj la Sovetio. De la vidpunkto de lernejo oni ne forgesu, ke la estontaj sciencistoj, sociaj agantoj kaj meĥiistoj devas ricevi tian lingvoscion, ke ili povu legi fakliteraturon, publikigitan per la grandaj kulturlingvoj. Estos eble malfacile publikigi sufiĉe da fakliteraturo per Esperanto. La esperantistoj povus eble esplori, ĉu la universaligo de Esperanto povus efektiviĝi grade tiel, ke la lingvo unue estus akceptata kiel internacia lingvo de la grandaj popoltavoloj, dum diversaj specialistoj havus la okazon havigi al si konon de la grandaj kulturlingvoj. Tio tamen facile influus, ke la instruado de fremdaj lingvoj ne povus esti konsiderinde limigata ekz. en la lernejoj de Finnlando. Eble la pritraktado de tiel vastaj kulturdemandoj devus okazi en Unesco. (Post tio sekvis aludo al Basic English kiel konkuranto de Esperanto). Estu kiel ajn, la bezono de mondlingvo kreskas kun la evoluo de la komunikiloj. Multaj lingvoj estos nur relikvoj de malnova tempo, kiam la plej multaj homoj vivis kaj mortis en la loko, kie ili estis naskitaj, sen kontakto kun la alia mondo. En la epoko de aerveturado kaj radio la internaciaj kontaktoj atingas universalecon kaj la bezono de mondlingvo estas pli kaj pli granda.

La direktoro de la popolinstrua sekcio, lerneja konsilanto A. Salmela diris, ke la Administracio jam longe konsideris la lernadon de Esperanto serioza kaj utila afero, kies envicigon en la programon de popola lernejo, kiel libervola fako, la Lerneja administracio neniel volas limigi. Laŭ la leĝo oni povas en la du superaj klasoj instrui maksimume du horojn en semajno iun ekstran fakon, laŭ decido de la (loka) lerneja direkto kaj kun permeso de la inspektoro. Kiel tia oni povas kie ajn enkonduki Esperanton. La postulo de la nomita permeso celas malhelpi, ke iu instruu fakon, en kiu li ne estas kompetenta, kaj neniel povas malfaciligi la enkondukon de Esperanto. Persone li esperas, ke kiel eble plej multaj instruistoj uzos la eblecon por tiel doni al siaj lernantoj okupon, kiu plivastigas iliajn perspektivojn kaj donas okazon al persona kontakto kun fremdlandanoj, kio sen Esperanto estas al la plej multaj popollernejoj neatingebla.

La direktoro de seminaria sekcio, lerneja konsilanto K. Saarialho diras, ke oni longe deziris instruon de fremda lingvo al seminarianoj. Tio nun efektiviĝos parte en kelkaj seminarioj. Tamen pasos multaj jaroj antaŭ ol komencanto povas mizere-kontentige uzi fremdan lingvon en parolo aŭ skribo. Kaj ankaŭ tiam liaj kontaktoj estas limigitaj al unu sola lingva distrikto. En tiu rilato la internacia lingvo Esperanto estas multe pli dankema. Oni lernas ĝin rapide kaj ĝi malfermas, kvankam kun certa

limigo, la tutan mondon. Mi povis ofte konstati la utilon de Esperanto, kvankam mi mem ne estis sufiĉe energia por ellerni ĝin. Plej bone mi memoras kiel foje dum eksterlanda ekskurso la esperantistoj estis multe favorataj antaŭ la aliaj partoprenantoj pro la helpo de siaj samideanoj. Mi enviis ilin precipe en Anglujo, kie mi tute ne povis havi min per mia lingvoscio.

La Suda Stelo, oficiala organo de Jugoslavia Esperanto-Federacio, aperas en Zagreb (Amruŝeva 5/1), redaktata de Dr Vuko Jovanović. Aperas provizore dumonate. Ni enskribu precipe la tre bonajn tradukojn prozajn kaj versajn de Bojidar Vanĉik.

Malgranda Revuo, eldonata kaj redaktata de Stellan Engholm en Ludvika (Svedio) kvaronjare en belaj 32-paĝaj kajeroj, aperas jam sesan jaron kun enhavo ĉiam interesa kaj instrua. En 1-a n-ro de tiu ĉi jaro la redaktoro difinas celon de la revuo sekve: „Mi volas, ke MR estu kiel eble plej multe spirite memstara revuo, esprimo de propra spirita aktiveco de esperantistoj. Por atingi tion, ĝi devas havi kiel eble plej multe da efektive originalaj artikoloj, originalaj ne nur lingve sed ankaŭ enhave. Ili donu novajn vidpunktojn, impulsojn, prezentu al la legantoj ion efektive pozitivan. Tio ne signifas, ke ni nepre postulas vastan erudicion. Simplaj klarvidaj observoj pri la ordinara homa vivo, serioze pripensitaj, povas doni multe da valoraj instigoj.“ — Programo tre instiga kaj simpatia kaj laŭ nia prijugo plenumata.

Belga Esperantisto, oficiala organo de Reĝa Belga Ligo Esperantista, reaperis en aŭgusto en revua formo, anstataŭante ĝistiaman bultenon. La kajero (10-paĝa) enhavas detalan raporton pri la Belga kongreso en Charleroi dum pentekosto, „bele sukcesinta“; sed ni ne trovis indikon pri nombro de kongresanoj nek pri temoj diskutitaj nek pri raportoj donitaj. Tamen la priskribo de la entuziasma humoro dumkongresa estas edifanta legaĵo, ĉar ĝi jam per si mem dokumentas novan vivantecon de nia movado en Belgio. (Direktoro de B. E. estas Maur. Jau-motte, 44, De Bruynlaan, 44, Wilrijk.)

Scienca Rondo. Faggazeto por fiziko, kemio, medicino, biologio kaj similaj fakoj. Oficiala organo de ISAE-ĉefdelegito por Germanio. Eldonejo: Inĝeniera sekcio, Esperanto-Centro (GIS) München 23, Postfach 47. — Sub tiu ĉi bombasta titolo aperis multobligitaj kajeroj 14-paĝa (15×21 cm); prezo 3 respondkuponoj por numero. — La propaganda efiko de tiaj eldonaĵoj estas nula. La aspekto ja iom fortimigas legi. La „fakaj“ artikoloj al fakulo povas diri nenion por li interesan, ne ĉiu ĥemiisto estas scivola legi paĝeton pri polienoj nek pri kalkulado de stabileco je memreguligantaj sistemoj. Tamen ĉiuj tiuj artikoloj estas interesaj laŭenhave. Sed senco de tiaj artikoloj povus esti sole en ilia lingvaĵo. Bedaŭrinde la redakcio ŝajnas esti iom facilanima precipe pri la lingvo. Oni uzas „destili“, kvankam fundamenta ĝenerale uzata vorto estas „distili“, oni tute ne atentis la formojn en Plena Vortaro nek iel atentis Sciencon Fundamentan Esperantan Terminaron. Ekz. oni sen klarigo de kialoj diras „alifata“, kvankam en n-ro 19 de la Bulteno de ISAE estas „alifatika“. Oni parolas pri „energeta imperativo“, kvankam angle oni diras Energetics, germane Energetik, france énergétique; sed uzo de doktrinaro pri energio por metafizika sistemo ne tro transiris limojn de la germana lingvo, kie ĝi havis nomon Energetismus, kaj tiun terminon oni devus traduki energiismo kaj diri konsekvenca energiisma imperativo (aŭ se oni volas energetika), sed ne estas kaŭzo diri energeta, ĝi ne estas komprenebla, ĉar Energetismus ne fariĝis vorto internacia. Oni uzas la vorton „referaĵo“ por raporteto aŭ resumo. Ni ne aprobas tiun vorton. Por germanoj „Referat“ kaj „Referendar“ estas „fremdaj vortoj“ kaj signifas raporton pri iu faka teknika temo kaj oficistan funkciulon, kies ĉefa tasko estas prepari tiajn teknikajn raportojn. En tiu senco transiris tiu radiko ankaŭ en la ĉeĥan kaj la rusan (sed tien ĉi kun jam sufiĉe ŝanĝita senco) sed angle „to refer“ signifas aludi, direkti, rilati, rilatigi, sin turni, do esence aliaj signifoj ol la germana „Referat“ kaj nur la angla substantivo „Reference“ havas la saman signifon kiel en la germana: „referenco“ (krome ĝi signifas aludo, direkto, rilato). En la franca la verbo référer signifas rilatigi, kompari ion al io (transitive) kaj intransitive raportoj. Sed Grosjean-Maupin enmetis en sian vortaron

sole „se référer“ tradukante „sin turni (al aŭtoritato, al juĝisto)“. Jen la kaŭzoj, kial Plena Vortaro saĝe enmetis sole la neoficialan Zamenhofan vorton „referato“ kaj por referi diras = raportoj kaj referaĵoj = referato. La samideanaj eldonaĵoj de Scienca Rondo ne koleru pro niaj kritikaj rimarkoj. Ili ja vidas, ke ni legis la kajeron atente. Sed ni pensas, ke por Internacia Scienca Asocio Esperantista sufiĉas bulteno unusola, nepre presita, ni preferas iom atendi eblecon aperigi gazeton tian. Ni ja fidas firme je paca evoluo de la situacio, kaj ĝi ebligas denove presigi organon por sciencistoj.

Inter servilulo kaj sklavo. Mi fieras por ke mi estas sklavo de komenco ĝis fino: Kvankam estas sub piedo de aliaj, tamen favoron mi ne petas.

Mi estas sklavo, vera sklavo de la kapo ĝis la piedo. Tia vivo, kian mi nun vivas, neniom al mi plaĉas. Oni al mi iom donus, mi ne ĝojas; iom mi perdus, mi ne pentas. Ĉar mi estas sklavo de komenco ĝis fino, malgraŭ gajno aŭ perdo.

En la mondo ne ekzistas „homo“ nek homeco: Estas nur tri nenormalaj vivaĵoj: la mastroj, la serviluloj kaj la sklavoj.

Se vi esperas gajni iom, do vi jam en servilulojn aliformiĝas el la sklavoj. Se vi timas perdi iom, do vi eble la servilulo jam fariĝus.

La sklavo estu toleri mizeron, estu persekutita kaj subpremita.

Se vi dezirus iom da trankvilo, da pozicio kaj da komforto, vi estas jam la servilulo.

Tiel terura estas la epoko.

Mi ĉiam antaŭgardas, insistas kaj konservas mian ŝanĝan koron de la sklavo.

Oni diris: „Vivi ŝajnas ke oni iras en la malhela nokto, mil atentoj ne faletu!“ Nun estas la plej malhela nokto el la malhelaj, ni devas kruele insisti. Kun mia senkompata peza koro mi al vi vokas: Revenu al obstina koro sklava!

Altedukitaj sklavoj, ni ĉiuj estas inter la serviluloj kaj sklavoj, estas tie unu tenta ponto.

Kiu havas koron kontraŭbatalan (aŭ kiu nur koron havas), tiu devas sindone akcepti la persekuton.

En la mondo ne estas sklavo kontenta, nek kvieta kaj nek flata. Ĉi tiuj ja estas serviluloj.

Jam estas la serviluloj, iru for!

Ni malcedaj sklavoj kriegu: Ne transiru la ponton. Ne transiru! —

Ni represas tiun ĉi artikolon, verkitan de Cenzao kaj tradukitan de Venjo Sen el Cina Revuo, numero 3 el jan.—apr. 1948. Ni salutas la reaperon de organo de ĉinaj samideanoj kaj atentigas pri la bona stilo kaj originaleco de iliaj verkantoj. La artikolo estas komplete ĉin-devena kaj tamen la stilo preskaŭ ne diferencas de stilo eŭropa. La nekutima vorto „Servilulo“ bone redonas ideon esprimotan. (Adreso de la Ĉ. R.: P. O. Box 175 Chungking.)

Pri Izraelio. Alia viva ekzemplo por nia aserto, ke la uzo de artefarita lingvo estas politika demando, montriĝas hodiaŭ en tute nova ŝtato, kies estiĝon ni ĉiuj povas observi, nome Izraelio. En tiu tute nova ŝtato oni depost multaj jaroj parolas lingvon artefaritan: „ivrit“. Tiu lingvo baziĝas sur la antikva hebrea lingvo, kiu estis modernigita kaj adaptita al la hodiaŭaj vivbezonoj. Ĝi estas la oficiala lingvo en Izraelio kaj estas nova pruvo por tio, ke artefarita lingvo povas fariĝi viva lingvo. Samtempe ĝi pravas, ke la uzo de nova artefarita lingvo estas politika problemo. (Arbetar Esperantisten, junio-julio, Barhusgatan 8, Stockholm.)

Sindikata Esperantista Asocio Tutmonda estas fondata de laboristoj-esperantistoj en Francio. Adreso: 20, Rue du Béquet, Begles (Gironde).

Bournemouth, La Tutjara Banloko de Britujo, estas faldprospekto kun belaj bildoj kaj urboplano de la loko de la universala kongreso en 1949, „kie sunbrilo kaj gajo alestas“.

Skoltismo en Ĉeĥoslovakujo estas artikolo en 2-a n-ro de „La Skolta Mondo“. Estas tre salutinde, ke la „Skolta Esperantista Ligo“ havas jam denove propran presitan bultenon. Ĝi aranĝos dum la 34-a kongreso internacian tendaron apud Bournemouth. La skoltoj, kiuj povos partopreni, sciigu pri tio ĝeneralan sekretarion de la Ligo F. N. Blythe, 103 Leopold Road, Ipswich, Suffolk, Anglujo.

Esperanto-Fako de ĉ. skoltoj Junák aperigis poŝkarton varban kun bildo de skolto kaj ĉeĵingva alvoko: Por kunuleco de la mondo Esperanto estas bezona!

Plena Vortaro. Esperantisto, kiu por legi aŭ traduki uzas nur naci-esperantan vortaron, frontas ĉiupaŝe kontraŭ malfacilo k li emas akuzi la lingvon mem, kiu laŭ li havas tro da mankoj, da malprecizo. Nu, ni kiuj ĉiutage praktikas Esp-on dum pluraj horoj skribe, lege kaj parole, ofte konsultas Plenan Vortaron, k ĉiujfoje ni malkovras vorton aŭ esprimon novan. Tiu libro estas vera trezorujo, kiun ĉiu persono inda je la titolo esperantisto, ne povas nehavi. Tiu verko havas ankoraŭ alian avantaĝon, nome ĝi normigas la lingvon tiom en la uzo de terminoj, kiom de la esprimoj; ĝi gardas la lingvon kontraŭ devojĝo, degenero. (Sen-naciulo, Okt.)

Pri tradukado de versoj traktas en formo de sespiedaj versoj trokeaj Brenton Clark en Literatura Mondo numeroj 7/8 kaj 9/10. Li demonstras, ke tradukanto ne devas nepre ligi sin al versometro de la originalo. Tasko de tradukanto estas redoni al la leganto originalon nekonanta la enhavon de la teksto kaj la ritmon de la originala poemo kun la senta atmosfero, kiun originalo elvokas. Tio ne estas ĉiam atingebla per pura imito de la originala versometro, kiam la du koncernaj lingvoj diferencas en la natura ritmo de la parolo. La lerta versfaranto asertas:

Preskaŭ ĉio en la angla poezio
Marŝas laŭ la takto de la jamba ritmo,
Kaj kvintaktaj estas la plej multaj versoj.
Konsonantoj inter unusilabajoj
Kiel kugloj kontraŭ ŝildojn interklakas.
Male Esperanto estas ina lingvo,
Milda, dolĉa, flua, kun vokalaj finoj,
Kiuj kreas spacon inter la radikoj —
Lingvo taŭga por la amo kaj la paco.
Kiel geedziĝi tiajn malsamulojn?
Skandu do per jamboj versojn el Hamleto,
kaj rimarku la disrompon de la vortoj:
„Ne pre/nu prun/te kaj / ne prun/te donu“.
Poste skandu per trokeoj, kaj komparu:
Ne / prenu / prunte / kaj ne / prunte/donu ...“

Nur dum tradukado sentis mi la forton de la du tremigaj versoj en Hamleto:

„Tomboj kuŝis forlasite, kaj kadavroj en kiteloj
pepis kaj buŝoste babilaciis sur la Romaj stratoj“.

Elnaskinte tiun bildon nepre Shakespeare
Enlitiĝis kun la hirtiĝantaj haroj —
Kaj antaŭe ekrigardis sub la liton!
Kia perdo, kiam pro metrikaj limoj
Zamenhof tradukis jene tiujn versojn:
„Mortintoj sin ellevis el ta tomboj
Kaj promenadis tra la urbaj stratoj“.

Estas donitaj ankaŭ tradukoj rimataj el Browning kaj Keats, se ne mankus loko, mi citus pli longe. La argumentado de la aŭtoro estas ofte tre trafa. Sed ne ĉiam ĝi estos uzebla. Ekz. tuj ĉe tradukado por teatro oni ne rajtas forgesi, ke la dialogoj ne tro diferencu laŭ longeco de la originalo. Se la aktoro bezonas pli da tempo por ilin deklami, la efiko ŝanĝiĝas tre grave.

Unu el la kialoj de la profunda abismo inter Oriento kaj Okcidento estas la malfido de la registaroj unu kontraŭ la alia. Ĉi tiu malfido regas ankaŭ inter la popoloj. La orientaj popoloj ne facile forgesas la ofte renkontitan malŝaton flanke de la okcidentanoj, ofte konsiderantaj slavojn, balkananojn kaj azianojn kiel „subhomojn“, minimume kiel ne-samvalorajn homojn. La orientanoj ne forgesas la insultojn direktitajn de certa gvidanto kontraŭ ili kaj la primitiv-spiritajn klasifikon de „plenhomoj“ kaj „subhomoj“.

Estas konstatinde, ke la esperantista publiko entute simpatie rilatis kaj rilatas al orientaj popoloj, kaj ke scio pri ili estas videble pli serioza kaj vasta ol ĉe la ne-esperantista publiko. Tio estas unu el moralaj aktivaj de nia ideo, pruvante unu plian fojon la spiritan forton, kiun disradias Esperanto. (H. J. en „Esperanto“, oktobro.)

Bildon kaj nekrologon de Edvard Beneš enhavas „Esperanto“ el Oktobro. La aŭtoro Georges Agricola akceptu

dankon pro tre saĝaj vortoj. Jes, „Vero venkos“, ĝi ne perdis sian validon.

American Esperantist Bulletin estas maŝinskribita litografita bulteno de la Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko (114 West 16 Street, New York 11. N. Y.) redaktata de G. A. Connor. Ĝi dokumentas vigan organizan vivon.

Missouri. Nova grandskala Esperanto-klopodo bone sukcesis en ŝtato Missouri. John M. Brewer, profesoro ĉe la Universitato Missouri School of Mines komencis agadon, kiu rezultis en starigo de Esperanto-Klubo inter la studentaro kaj profesoro. La nomo de la nova klubo estas MOSAMO kaj laŭ raporto de la prezidanto Floyd Hoffman daŭre kaj konstante kreskas. La klubo estas oficiale aprobita de la Universitato. (American Esperantist Bulletin, majo-junio.)

Havano (Kubo). La ministro de instruado de Kubo starigis Esperanto-kurson en la universitato de Havano. Pasantan jaron oni donis Esperanto-kurson tie. En tiu ĉi somero de la 5-a de julio ĝis la 14-a de aŭgusto S-ro Heriberto Cociña gvidis kurson kvin horojn semajne en la Somera Lernejo. — Ankaŭ ekzistis radio-kurso en granda Radiostacio C. M. Z. marde kaj ĵaude po 15 minutoj; gvidis ĝin D-ro Antonio Aleman Ruiz. (American Esperantist Bulletin, majo-junio.)

Esperanto-stando dum la Genta Foiro signifis efikan propagandon ankaŭ por Ĉeĥoslovakio. Jaroslav Koltán el Nová Ves apud Pacov liveris por ĝi riĉan materialon, bildojn el nia respubliko, poŝkartojn kun naciaj kostumoj, portreton de episkopo de Praha Eltschkner ktp.

De Maasbode, grava ĵurnalo nederlanda, alportis artikolon de Jar. Koltán el Nová Ves pri la pilgrimejo Sv. Hora. Tradukis ĝin el Esperanto samideanino Truus Durenkamp, kiu antaŭ nelonge vizitis Ĉeĥoslovakion.

Fervojistoj-esperantistoj el Danubregionaj landoj kunvenis laŭ invito de la hungaraj fervojistoj dum la Hungara kongreso en Győr 16—17-a de majo. El nia lando partoprenis s-o Vlastimil Blažek, oficiale komisiita de la Fervojdirekcio en Olomouc, kaj li transdonis al la hungaraj kolegoj esperantajn tradukojn de ses internaciaj konvencioj pri fervoja servo. La hungaraj promesis multobliĝi la tradukaĵojn kaj prezenti ilin al fakuloj teknikaj kaj lingvaj. Poste estos ellaborita faka terminaro. Pri tiu iniciato estis informitaj fervoj-ministerioj hungara kaj ĉeĥoslovaka. S-o Vl. Blažek estis komisiita de la fervojministerio daŭrigi preparojn por esplori uzon de Esperanto en la fervojservo.



Propaganda, jakou nechceme. Jedna z nálepek, vydaných p. J. Dittrichem, byla citována v Tvorbě (z 13. X. 1948) s posměchem, myslíme, oprávněným. Ani se všemi ostatními texty těchto nálepek nesouhlasíme, zvláště ne s tím, že jejich citace na př. z T. G. M. jsou nepřesné a pro nezalého zcela omylné. Masaryk nikdy neřekl, že každý idealista by měl být esperantistou. Také Jan Masaryk je na jiné nálepce citován, patrně z našeho 3. čísla, zcela nepřesně. Velmi ctíme horlivost a iniciativnost samideánů. Přece však je prosíme, aby vždy dbali o to, aby aspoň citace byly přesné. O potřebě a užitečnosti esperanta lze přesvědčovat, aniž nadsazujeme, aniž cokoli zatajujeme a aniž cokoli předstíráme. Ano, jsme sdružením zcela soukromým, esperanto nemá nikde podpory veřejnoprávních institucí, autority nás příliš neodporují. V tom však, přátelé, není náš nedostatek, ale naše sláva. Není lidovějšího usilování než je usilování naše. Snad právě proto je naše hnutí v zemích lidových demokracií daleko lidovější než v zemích západních. Avšak právě proto nesmíme v našich projevech k veřejnosti neesperantské nic předstírat ani nic zastírat.

Novaj gzatulkaztoj

al Kristnasko kaj Nova jaro. Nia librovendejo liveras 10 ekz. kun kovertoj afrankite por Kčs 17.50.

RICEVITAJ LIBROJ

Morto de trajno. Freeman Wills Crofts. El la angla lingvo tradukis Mason Stuttard. 1948. The Esperanto Publishing Company Ltd. Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo. 256 paĝoj, 13×19 cm. 9 ŝilingoj, afranko 6 p. — La aŭtoro mem estas esperantisto. La tradukinto estas tre bona stilisto, konata ankaŭ el recenzoj en „*Esperanto*“. La libro estas detektivromano en la plej bona senco de la vorto. Ĝi rolas dum la milito, kiam germanoj en Afriko atakis. Germanaj spionoj en Anglujo klopodas saboti la defendkapablojn de angloj kaj volas pereigi trajnon, veturigantan gravan materialon por Afriko. Ili ne sukcesas por oferema kaj sagaca agado de polica inspektoro French, sed ĉefe pro kvalitoj de ĉiuj rolantaj personoj, komencante de ĉefministro kaj finante per la simplaj konduktoroj kaj fervoĝardistoj. Tiu priskribo de la mensaj kvalitoj de la angla popolo estas la plej bela en tiu libro. La traduka lingvaĵo meritis apartan studon. Ĝi evitas neologismojn kaj malolitajn parolturnojn, kvankam la lingvaĵo de la originalo devas esti tre teknika, ĉar en la unua parto estas detale priskribata deĵorado de fervojistoj kaj funkciado de la maŝinoj kaj vagonaroj. La tradukanto aldonis paĝon de klarigoj de la fakaj terminoj kaj du desegnojn de la trakaraĝoj. Tio tre helpas al la leganto. La traduklingvaĵon mi tre laŭdas. Ĝi estas tre facile komprenebla. Precipe mi atentigus pri lerta uzo de vortoj kreitaj per -eg. Tiu rilato ne estas ofte esprimita en lingvoj per ia sufikso, tial per -egkreiĝas ofte vortoj nefacile tradukeblaj sed tamen tre klaraj. Sed mi nepre mallaŭdas diri telefoni iun anstataŭ al iu, tio estas troa imito de la angla dirmaniero. La tipografia aranĝo de la libro estas plaĉa, kiel ĉe tiu ĉi eldonejo estas kutimo.

Ed. V. Tvarožek: Esperanto ve 14 úlohách. II. doplněná a opravené vydání. 1948. Vydal Slovenský Esperantský Ústav v Turčianskom Svätom Martine. 32 paĝoj 14×18 cm. Prezo 20 + 1,50 Kčs afr. — Dua eldono de la slovak lernolibro, aperinta antaŭ jaro ciklostilite. Nun ĝi aperas maŝinskribe litografita, tre bele aranĝita por uzo de studentoj nian lingvon. La ekzercoj enhavas plejparte propoziciojn kaj frazojn disajn, ne en teksto de artikolo. Tio ebligas, ke ili turnu atenton de la leganto ekskluzive al instruata gramatika aŭ vortara temo. En la fino de la libreto estas „*Slosilo*“, ebliganta al memlernanto kontroli sian laboron. La lasta teksto estas la glora Zamenhof-letono al Borovko, kiu tre meritis unu pluan represon. La nova eldono de la lernolibro certe allogos ne unu homon por ekstudi nian lingvon.

Sinopse estatística do Brasil 1946. Instituto Brasileiro de Geografia e Estatística, Rio de Janeiro. Serviço Gráfico do Instituto Brasileira de Geografia e Estatística. 1947. 268 paĝoj 18×28 cm. — Statistika resumo pri Brazilo, kiu krom la portugala enmetis al ĉiuj titoloj kaj ĉiuj nombroj tekstojn ankaŭ en la angla kaj en Esperanto. Rezultis el tiu trilingveco statistika verko neordinare bone uzebla. La trilingvaj tekstoj estas tipografie tre bone metitaj, ili neniel ĝenas pro longeco, ĉar oni uzis tre taŭgajn prestipojn. Kaj por uzebleco de la libro tiu ĉi trilingveco estas treege utila. Eĉ bona scianto de la angla lingvo volonte rigardos la tekstojn esperantlingvaj. Ĉar temas ofte pri tre detala priskribo kaj terminoj anglaj ne ĉiam estas tuj klaraj por ĉiu. La esperanta termino ofte estas tre utila klarigo. Foliante tiun libron ni denove sentis ĝuon el klareco de Esperanto, ĝian taŭgecon esprimi nuancojn ofte pli klare ol nacia idiom. La aŭtoroj de la Esperanta teksto meritis admiron pro ilia laboro. Temis ja pri terminoj ofte tre fakaj, kiuj devas redoni nomojn por substancoj kaj rilatoj ne ofte nomataj. Ke ili povis tion fari dum tempo, kiu certe urĝis, en tiu lingva kvalito, ili ricevu gratulon apartan.

La enhavo de la libro mem honorigas la brazilan statistikan oficon. La kolonoj estas faritaj tre superrigardeblaj, kaj la foliumanto vidas, ke la tabeloj estas rezulto de laboro tre sistema kaj tre zorgema. La ciferoj trovataj per si mem dokumentas la floradon de tiu granda lando sudamerika. Ŝajnas, ke tiu bonfarto rezultas el laboro tre konsciencia kaj tre honesta. La aŭtoroj de la libro permesu, ke ni per ili salutigu la popolon de la Brazilo plej amike kaj sincere.

Jarlibro de la Universala Esperanto-Asocio. 1948. Dua parto. Nur por uzo de membroj. 48 paĝoj. — Tre bela broŝureto ĵus aperinta. Aldonoj kaj ŝanĝoj en Adresaro de la delegitoj vidigas viglan vivon de la Asocio. En Belgujo, Brazilo, Francujo, Germanujo, Svedujo oni trovas novajn adresojn. Ie iom ŝokas pluraj indikoj pri vakiĝintaj postenoj — precipe de fakdelegitoj. La tre bela broŝuro enhavas Statuton de UEA reviziitan en Aŭgusto 1948 kaj novan Statuton de la Akademio de Esperanto.

La tridekuna kongreso de la bulgaraj esperantistoj, Jambol, 21—23. VIII. 1948. Sofio 1948. 20 paĝoj 14×20 cm. — Broŝuro kun tre instruaj artikoloj, kiujn legi estas tile eĉ por tiuj, kiuj neniam kongresis nek kongresos en Bulgario. Ni citu: „La landon savis la politika batalunuigo Oteĉestven Front (Patrolanda Fronto), fondita en 1942 laŭ iniciato de la granda kontraŭfaŝisto, nuna prezidanto de la Ministra konsilantaro de la Bulgara Popola Respubliko, gvidanto de Bulgara Laborista Partio (komunistoj) kamarado Georgi Dimitrov, kiu tre simpatias al la Esperanto-movado. Al ĝi simpatias ankaŭ la ministro de la publika instruado k-do D-ro Kiril Dramaliev.“

Urbo Sao Paulo, 48 paĝoj. 20×22 cm, da belaj bildoj kaj de tekstoj portugala- kaj esperantlingvaj, eldonita de la Instituto Brasileiro de Geografia e Estatística por signi la okazigon en la ĉefurbo Sao Paulo de la XI-a Brazila Kongreso de Esperanto la 13-an—21-an de Septembro 1947. La verko montras imponajn panoramojn de tiu ĉi ĉefurbo, situata 800 metrojn super l'Oceano, kiu rapidege kreskis nur en la dudeka jarcento kaj nun kalkulas ĉirkaŭ 2 milionojn da enloĝantoj. Sen Esperanto mi certe ne estus foliuminta tian libreton, el kiu mi eksciis multon pripensindan pri Brazilo.

Tekstaro de la Filmbendo. N-o 148/7. Titolo: Sovaĝaj bestoj de Afriko. Esperanto-Film-Grupo. Prez. J. F. C. M. Dercks. Fondita: 15-an de Junio 1947. Koresponda adreso: Antwerpsestraat 45, Bergen op Zoom (Nederlando), 24 ciklostilitaj paĝoj, 21×15 cm. — Tekstoj por la filmbildoj sur la bendo (sume 45 bildoj). La tekstoj estas klaraj kaj informas bone pri la prezentata bildo.

Prospekto de la Filmstrioj de la sama eldonejo en la sama aranĝo, 36 paĝoj. Ĝi pruvas la ampleksan laboron de la eldonantoj. Interese oni pledas por la filmstrio kontraŭ mallarĝa filmo: El filmoj oni kutime kunprenas ne pli ol necertan ĝeneralan impreson kaj agrablan senton. La unua elemento ĉefas. Uzante lumbildon oni povas adapti sin al la cirkonstancoj kaj preparoli la bildon, kiom longe oni deziras.

DANIEL QUARELLO:

LERNU ESPERANTON

La libro kiu kreas majstrojn de nia lingvo.

PREZO AFRANKITE: 15 Kčs.

Eldono QUARELLO & CIA, Buenos Aires.

Organizo dediĉita al la disvastigado kaj instruado de Esperanto.

AĈETU ĈE LA LIBROVENDEJO DE EACSR.

LOKAJ INFORMOJ

Brno. — Depost 15. IX. daŭras du paralelaj kursoj por 63 p. Instruas J. Vondroušek kaj J. Kořínek laŭ Kilianlernolibro. Kurson por progresintoj vizitas 40 p., instruas J. Friedrich, J. Kořínek kaj J. Vondroušek. La kursojn anoncis 500 afiŝoj kaj gazetanoncoj.

Břeclav. — La ĵurnalo Rovnost en Brno anoncas revivigon de la loka E-grupo.

Česká Lipa. — En la regiona ekspozicio montras esperantistoj dokumentojn pri la vasta skriba interrilato de loka E-klubo kun la tuta mondo.

České Budějovice. — Esperantista klubo La Progreso malfermis la 5. X. en hotelo Slunce kurson kun 45 p. Instruas prof. inĝ. L. Krajčíc laŭ propra metodo.

Dvůr Králové n. L. — La 16-an de Oktobro faris prof. Miloš Lukáš el Hradec Králové por 90 ĝelernantoj de la gimnazio (laŭ speciala invito de la direktoro) paroladon pri la problemoj de lingvo internacia.

Hradec Králové. — La 20-an de Septembro komencis la Klubo varbadon por kursoj per grandaj afiŝoj en multaj montfenestroj en preskaŭ ĉiu strato kaj per ekspozicioj de E-libroj en du butikoj. Ankaŭ la koncerto de s-ino Santreuil (250 vizitintoj) tre bone efikis. Okazas: kurso publika, 35 p., gvidas St. Váňa; kurso en faka lernejo por metiaj lernantoj, 20 p., gvidas Fr. Pytloun; tri kursoj en la ambaŭ gimnazioj, gvidataj de prof. M. Lukáš por 75 studentoj. — Librovendisto s-ro Pultar disvendis dum monatoj Julio—Septembro 120 lernolibrojn kaj 40 vortarojn, kio certe dokumentas viglecon de esperantista vivo en la urbo. — Inter studentoj de Somera E-Lernejo en Doksy estis 6 % da Hradecanoj; ĝi estas plua pruvo de tiu vigleco.

Jablonec nad Nisou. — Komitato de nove fondita Loka Grupo de EAČSR: prez. št. kapit. en pensio Josef Roubínek, V. luzích 22, vicprez. Ant. Kopecký, Jablonecké Paseky 29, sekret. Jeroným Janečka, Skřivánčí 66, kas. Miroslav Jakeš, Rýnovická 66.

Jindřichův Hradec. — Danke al helpo de prof. Mikuláš estis formita E-rondeto en la komerca akademio; 16 p. studentoj lernas tie lingvon laŭ lernolibro de Kilian.

Jihlava. — En Komerca lernejo triagrada komenciĝis en Septembro kurso por 12 studentoj, gvidata ĉiun lundon je la 18—20 h. de konata esperantista laboranto redaktoro Jan Zeman, tre bone konata al esperantistaro el la ĵurnalo Ĉin, kie li gvidis modelan E-rubrikon. — Laŭ lia iniciato estos dum vintro fondita E. Klubo. — Ankaŭ laŭ lia iniciato aperas sur lokaj paĝoj de ĵurnaloj Práce, Rudé právo, Rovnost, Svobodné slovo, Obroda ofte sciigoj pri esperantista vivo kaj aktiveco. — Tiuj, kiuj volas aliĝi al la fondata klubo kaj estas emaj kunlabori, anoncu sin ĉe s-o J. Zeman, redaktoro de Práce en Jihlava, str. Dr E. Beneše 28, telefono 542. — Ni tre ŝatas, ke en tiu grava urbo komencas organiza vivo.

Karlovy Vary. — Dimanĉe la 7-an de Novembro vizitis nian klubon grupo de gesamideanoj el Cheb. Ili alvenis antaŭtagmeze kaj ni pasigis la tempon en nia klubejo. La intercitan posttagmezan trarigardon de la urbo malobligis konstanta pluveto, do ni kantante kaj interbabilante sidis komune en amika rondo en nia klubejo. La vizito ekkomencis serion de reciprokaj vizitoj, kiuj celas plivigliĝi la esperantistan vivon en la VI-a regiono. — Dimanĉe la 21-an de Novembro vizitis nia E-klubo la E-klubon en Cheb, kie ni estis vere fratece bonvenitaj kaj riĉe gastigitaj. En ia bela propra klubejo de EK Cheb ni amike amuziĝis kaj planis la plivigliĝon de E-movado en la VI-a regiono. Ni ricevis eĉ belan donacon, bildon kun esperantista emblemo, kiel rememoraĵon de nia vizito. Nelacigebla s-ano F. Mašek per sia lerta tir-harmoniko bonege zorgis pri nia bonhumoro dum vagonara vojaĝo kaj en la ĥeba E-klubejo.

Kosmonosy. — Statuto de nia Loka grupo aprobita de ZNV en Praha la 15. VII. 1948 (n-ro I/6 2004—1948). La fonda kunveno okazis la 7-an de Septembro. Komitato: prez. Jarosl. Bláha, maŝina seruristo, Kosmonosy 303, vicprez. Marie Bartuňková, admin. oficistino, Kosmonosy 550, sekret. Věroslav Semecký, admin. ofic., Kosmonosy 467, kas. Miroslav Semecký, tekn. ofic., Kosmonosy 467.

Košice. — En Orientslovaka muzeo estis malfermita la 25-an de Aŭgusto riĉa E-ekspozicio.

Liptovský Sv. Mikuláš. — En SEM (Unuiĝo de protestanta junularo) aranĝis Miloslav Janek paroladon pri E. kun kantoj kaj alia riĉa programo. En loka gimnazio Miloš Droppa parolis pri nia afero kaj sekvis viva debato. En murgazeto estas ofte menciata E.

Lobkovice apud Jablonné n. Orlicí. — Josef Fogl gvidas kurson en loka meza lernejo.

Modřany. — Statuto de nia Loka grupo aprobita de ZNV en Praha la 5. VIII. 1948 n-ro I/6—2337—1948.

Náchod. — En gimnazio oficiale instruas en la lernejjaro 1948/49 Esperanton kiel nedevigan fakon (en „interesula studa rondo“) s-o prof. Jan Filip.

Olomouc. — En Dobrovský-lernejo popola komenciĝis en fino de Septembro kurso por 22 p., gvidata de s-o Ing. Řebíček. — La 22-an de Septembro komencis kurso, aranĝita de loka Kleriga Konsilantaro, en la gimnazio; instruas inĝ. Jar. Řebíček. Kurson por progresintoj gvidas ĉiun ĵaŭdon s-o Kuba je la 18-a horo en la klub-ejo. — S-o Vašek gvidas apartan kurson por fervojistoj.

Opava. — Vladimír Slaný, konata radioparolanto el Ostrava, instruas depost 15-a de Oktobro en du kursoj 50 komencantojn. La aranĝon ebligis, ankaŭ per financa subteno, la Kleriga Konsilantaro de Centra Nacia Komitato en Opava. Dankinda estas precipe ĝia inspektoro Pišala, kiu per sia interveno ebligis eklaboron de la nova klubo en Opava.

Plzeň. — ŬRO (kultura komisiono) konsentas kun fondado de Esperanto-amikaro en fabrikoj (odbor přátel esperanta při závodních klubech ROH). En fabriko Škoda en Plzeň komencas funkcii tia grupo. Unua paŝo estis propagando per disaŭdigo en fabriko. Okazis kvinminuta parolado pri Esperanto por varbi novajn kursanojn. La laboro ne estas facila. Multaj aliaj organizoj kaj kulturaj kaj gimnastikaj fakoj interesiĝas pri la junularo. La unua kurso komencis en Septembro por knaboj el Uničov, kiuj laboras provizore ĉi tie kaj loĝas en fabrika kolonio. Aliĝintoj estis 40. Sed pro la fakto, ke parto de ili alterne laboras posttagmeze kaj ofte 12 horojn, la nombro reduktiĝis al 12 kamaradoj. Kurso 1 vesperon en la semajno. Ili montras viglan intereson. Alia kurso okazis la 7-n de Oktobro posttagmeze de la 3—5 horo por ebligi al geknaboj eksterurbaj partopreni. Aliĝis 16 gekamaradoj. Eble la duan lecionon ĉeestos pli multaj. Aliaj kursoj por metilernantoj estas preparataj. Adreso: Odbor přátel esperanta, ROH Škoda Plzeň. (J. Pelcman)

Podmokly. — La 6-an de Oktobro komenciĝis E-kurso por 50 komencantoj kaj 10 progresintoj. Instruas Arnošt Chmel kaj Růžička laŭ lernolibro de Kilian. La kurso estis aranĝita sub protekto de Distrikta Kleriga Konsilantaro, la ĉambron disponigis Loka Lerneja Konsilantaro.

Šumperk. — Bohumil Holý instruas en kurso aranĝita de fervoja direkcio Olomouc.

Tábor. — „Esperanto - bona dum milita helpanto“ estis temo de parolado de M. Frolíková el Pisek en Loka Grupo la 27-an de Septembro.

Tanvald. — La 6-an de Junio ekskurso al Jizerka, aranĝita de EK Tanvald. Partoprenis samideanoj el Liberec, Jablonec n. Nisou, Turnov, Mnichovo Hradiště, Mladá Boleslav. (EKT)

Trenčín. — La 12-an de Oktobro finiĝis unumonata kurso, kiun organizis J. Lamačka kaj gvidis profesoro s-ano Jaroslav Procházka. Oni instruis tri foje semajne po 1½ h.; dum kurso okazis prelego de s-ano M. Sepřová el Nové Mesto n. V. je la temo: Dua Tut-slovaka E-Kongreso en Košice. — Dum pasintaj monatoj aperis 90 diversaj specoj de bildkartoj kun esperanta tekstoj. La bildkartoj prezentas vidindaĵojn de la urbo Trenčín kaj Váh-valo kaj estas bonege uzablaj ĉe esp. korespondado. Mendebaj ĉe: „Esperanto-Servo“, Trenčín, Pod Sokolicami. Prezo: 1 serio kostas 30.— Kĉs (aŭ 7 rpk.), 1 kolekto kostas 150.— Kĉs (aŭ 32 rpk.). Eksterlandanoj bonvolu sendi esp. librojn, se rpk. estas ĉe vi malfacile riceveblaj. (E. Servo T.)

Třebíč. — Statuto de nia Loka grupo „Esperantista Klubo en Třebíč“ estis aprobita de ZNV en Brno la 30. VII. 1948 (n-ro 36 105—II/12—48). Dum ĝen. kunveno la 27. IX. estis elektita la jena komitato: prez. Th. Kilian, Příční 18, vicprez. Berta Zahrebná, sekret. Jos. Poláček, Stalinova 72, kas. Karel Turek, arkiv. Marie Mládková, anstataŭanto Jan Dokulil, protok. Jos. Hnizdil, reviz. Luisa Křepelová kaj Fr. Nestřeba, anst. Jaroslav Voda.

Uherské Hradiště. — Statuto de nia Loka Grupo aprobita de ZNV en Brno la 30. VII., n-ro 36 106—II/12—1948.

Ústí nad Labem. — Fonda ĝen. kunv. de Loka Grupo de EAĈSR la 19-an de Majo kun solena programo. Elektita komitato: prez. F. Mothejzik, H. Kvapilové 1/III, Ústí, vicprez. Jaroslav Dušek, Tr. nár. odboje 256, sekret. Helena Prokýšová, Masarykova 113, Ústí, kas. Miloš Hlaváček, Gottwaldova 21, Ústí, bibl. dro Hrneček, Růžový palouček 5, Ústí, protok. Jiří Rys, Žukovova 59, Sřfekov, gaz. sekciestro Stanislava Sládková, Červený vrch 1, Ústí, informa servo Anna Kořvancová, nám. Dr Beneše 13, Ústí, prop. inĝ. Vodrážka, Růžový palouček 5, Ústí. Konversaciaj kunvenoj ĉiumerkrede en strato Velká hradební 49, komitataj kunvenoj trian merkredon en ĉiu

monato. Esperantistoj de Ústí multon helpis al disvolvo de nia afero en tiu regiono, ili kunhelpis la fondon de niaj grupoj en Podmokly, Teplice, Litoměřice kaj Chomutov.

Vsetín. — Fonda kunveno de la Loka Grupo de nia Asocio okazis la 8-an de Septembro dum ĉeesto de 25 membroj krom plujaj 5, kiuj senkulpigis sian neĉeeston. La kunvenon salutis malnovaj samideanoj A. Berka, Machala el Pržno kaj Bednařik el Ústí, kiuj esprimis ĝojon, ke nun ili ne plu estos izolaj sed povos ĉiujn merkredojn kunveni kun novaj samideanoj. Estis elektitaj komitatoj: A. Berka prezidanto, St. Bednařik vicprezidanto, Josef Zajic sekretario, Jana Kovářová kasistino, Jaromir Halbina propagandisto, Anna Urbanová bibliotekistino, Václav Riedl kaj Jar. Slováček revizoroj, Tomáš Machala, Oldřich Kovář kaj Jar. Doubrava vickomitatoj. La kunveno decidis aranĝi apartan Esperantostandon en Regiona ekspozicio „Valaĥujo laboranta“ en 1949. Ni salutis novan fokuson de nia agado. — La statuto estis aprobita de ZNV en Brno la 30. VII. 1948 n-ro 36107—II/12—48.

Žatec. — Distrikta kleriga lernejo anoncas malfermon de E-kurso.

SCIIGOJ

Akademio de Esperanto. Tio estas nova titolo por la plej supera lingva instanco esperantista, kiu laŭ rezulto de balotado de Lingvakomitatoj en septembro 1948 anstataŭas la gloran nomon Lingva Komitato Esperantista kun ĝia Akademio. Estis akceptita nova statuto, kiu principe ne tro diferencas de la estinta. Nombro de akademianoj devas esti ĉirkaŭ 40 kaj ne superi 50. Pri kandidatoj estos demandataj landaj asocioj. Nuntempe havas la Akademio 47 membrojn restintajn post la milito. Ili balotos pri la 21 ĝisnunaj membroj elirantaj pro tio, ke ilia funkcio ĉesas en jaroj 1946, 1947 kaj 1948. Estos proponitaj plujaj 23 kandidatoj, por kiuj venis proponoj al prezidanto dum la lastaj jaroj. Tiel venos regula ordo en la funkciado de la Akademio. Estos elektitaj ankaŭ estroj de sekcioj (gramatiko, ĝenerala vortaro, teknikaj vortaroj, literaturo, bibliografio).

Mi balotis kontraŭ forigo de la nomo Lingva Komitato sed mia propono ne estis akceptita. El ĉefoj estas nun anoj de la Akademio Hromada, Dr Kamarýt, Dr Pitlik. Prezidanto estas J. R. G. Isbrücker (Oostduinlaan 32, Den Haag, Nederlando). Mi ĉiam fieris pro titolo Lingvakomitato. Mi hezitos uzi titolon akademiano. Mi estas maljuna viro, mi ne povas senigi min de komikeca tono, kiu sonas en tiu ĉi nomo por societo sen iu ajn apogo mona kaj oficiala. Al laboruloj simplaj, kies aŭtoritateco sekvas ekskluzive el iliaj laboremo kaj s'nduĉiĉo al senprofita kaj senloga klopodado, decas ekskluzive ankaŭ la plej modesta titolo.

(Dr Stan. Kamarýt)

Al SAT-anoj en ĈSR! Membra kotizo por 1949 estas 50.— Kĉs. Ĉiu membro sendu kompletan adreson, profesion, aĝon. — Belaj SAT-kalendaroj po 2.— Kĉs estas haveblaj. Mendu ĉe la landa peranto: Frant. Kalný, Libušinská 229, Plzeň XV.

Esperantistoj komunistoj, kiuj deziras kolektive labori en la kadro de nia Asocio, kiel komunisto fako, aliĝu kaj sendu minimume 10 Kĉs al la adreso: Esperanto, Plzeň, Hradiště 95. K-do J. Pelcman zorgos pri la cetera laboro.

(J. P.)

Al Danubvala Kontakta Komitato aliĝis ankaŭ Slovaka Esperanto-Societo (laŭ informo de s-o MUDr L. Izák).

Subtenu nian laboron! Nova grupo Uničov apud Olo-mouc, ĝis majo 1948 sidanta en Plzeň, kaj grupo Škoda-Plzeň bezonas materialon por progresintoj. Samideanoj aŭ grupoj estas petataj donaci aŭ vendi iom da legaĵoj. Ĉion, ankaŭ proponon pri konkurso, sendu al la adreso: Esperanto-Amikaro ROH Škoda-Plzeň. Indiku, por kiu grupo.

(J. P.)

Se troviĝas inter viaj kursanoj ĝeskoltoj, bonvolu interesiĝi ilin al abono de skoltesperantista gazeto „La Skolta Mondo“, organo de Skolta esperantista ligo. Mendu ĉe SEL agente St. Lešinger, Praha, Pankrác 356. Ĝeskoltoj fariĝu membroj de Skolta Esperantista Ligo, kotizo al SEL estas Kĉs 30 (kun la gazeto).

Onisabro Degučí, la ĉefo de la Oomoto-movado kaj fervora amiko de Esperanto, mortis la 19. I. 1948 en aĝo de 78 jaroj en Kameoka (Japanio). Siatempo oni raportis, ke por defio (li rajdis sur blanka ĉevalo, kio estis privilegio de l'imperiestro), li estis arestita; sed sendube lia aresto okazis ankaŭ pro aliaj motivoj. La militino liberigis lin post sesjara mallibereco. Oomoto (granda fundamento) estas unu el multaj religiaj movadoj, kiuj svarmas en Japanio grandnombre. Ĝi per multparolaj versaĵoj kaj prozaĵoj predikas homamon kaj la ĉefon Degučí rigardas kiel profeton, al kiu supernatura Racio revelaciis la absolutan veron. En ĝia celado verŝajne enestas ankaŭ tendencoj socie reformaj. La japana registaro antaŭ la milito tiajn movadojn toleris, sed de tempo al tempo arestadis iliajn apostolojn; ŝajnas, ke la enkarcerita traktado ne estis tro kruela, Degučí povis, arestita dum kelka tempo jam antaŭ la milito, en la karceroj verkadi kaj kontakti kun siaj disĉiploj. Almenaŭ oni povis tien konjekti el esperantlingvaj gazetoj, kiuj propagandis la Oomoto-movadon.

Nova regiona peranto en la XIII-a regiono fariĝis inĝ. L. Krajič en České Budějovice, Žižkova 42. Ni salutis lin en lia nova funkcio ĝoje kaj uzas la okazon por danki al s-ano Josef Ploss, demetinta tiun funkcion, pro la servoj, kiujn li faris al nia movado dum vico da jaroj.

Labor-grupo de Skolta Esperantista Ligo en Praha: Agente de SEL: St. Lešinger, Praha-Pankrác, Libušina 34, Praha. Sekretario: Jaroslav Nedvěd-Jaron, Klimentská 24, Praha II. Kasisto: Zdeněk Křicner, Reprezentanto de Esperanto-Fako de Junák: Frant. Buhr, Břevnov 514, Praha XVIII.

SAT-peranto por Ĉeĥoslovakio estas k-do František Kalný en Libušinská 229, Plzeň. K-do J. Kollmann (Dunajská 84, Bratislava) estas regiona SAT-peranto por Slovakio.

La redaktoro de „Esperantista“, vicprezidanto de nia Asocio, D-ro Stan. Kamarýt ĝisvivis la 10-an de Novembro sian 65-an jaron en plena aktiveco por nia movado, al kiu li sin dediĉas jam preskaŭ 50 jarojn. Ni petas lin, ke li akceptu niajn korajn bondezirojn por multaj plujaj jaroj. Kaj ni esperas, ke en sia modesteco li ne tro koleros, ke sen scio de la redaktoro ni enmetis ĉi kelkajn liniojn.

La Komitato de Esperanto-Asocio.



Internacia klubo por interŝanĝo kaj korespondado. Membrolisto aperas kvaronjare. Pli ol 1100 membroj en ĉiuj landoj. Jara kotizo 50 Kĉs, Britujo kaj kolonioj 5 ŝil., Usono 1 dolaro aŭ samvaloro, 12 respondkup, ankaŭ akceptataj. Direktoro: Vilém Nesler, Box 25, Jičín, Ĉeĥoslovakio.

ESPERANTISTA VIVO

Edziĝis regiona peranto Vlastimil Blažek en Olomouc kun fraŭlino Marie Sigmundová, la 16-an de Oktobro.

Edziĝis Dro Zdeněk Šprinc, prezidanto de Altlerneja studenta unuigo en Olomouc, kaj samideano Dro Stanislava Kavanová, la 16-an de Oktobro.

Edziĝis Stanislav Majer, nia membro en Troublelice, kaj fraŭlino Anička Kopečková el Nová Dědina, la 30-an de Oktobro.

Sinceran gratulon al ĉiuj tri geedzaj paroj!

Mortis s-ano Karel Drdla en Brno la 15-an de Oktobro. Li estis firma apogo de niaj laboroj, precipe en la antaŭmilitaj jaroj. Pro sia nobla karaktero li estis ĝenerale ŝatata. Ni multe rememoris lin dum lia malsano kaj neniam lin forgesos. (E. K. Brno)

Mortis Konstantin Koutek, unu el la plej aktivaj kunlaborantoj en la ĉefurbo, la 14-an de Septembro 1948. Kremaciita estis en Liberec la 17-an. Li naskiĝis la 11-an de Marto 1880 en Turč. Sv. Martin. Esperantisto li fariĝis en j. 1905 kaj depost tiam li seninterrompe partoprenis la esperantistan vivon en Praha, ofte en gravaj funkcioj. Siatempe li estis komitatano de Bohema Societo Esperantista. Plurajn jarojn li estis prezidanto de la Esperantista Klubo en Praha, vicprezidanto de nia Asocio, portanto de nia Librovendeja koncesio (dum la „Protektorato“); dum la kongreso en Praha li ludis eminente en Nokto en Karlův Týn rolon de ĉefepiskopo Arnošt z Pardubic; en j. 1935—1939 li gvidis konversaciajn kunvenojn por perfektigi esperantistojn de la ĉefurbo en la lingvo. Mi citas tiujn faktojn por vidigi diversecon kaj ampleksecon de lia aktiveco. Li estis krom Esperanto ankaŭ tre bona sciinto de la franca

lingvo, kiun li iam amatore instruadis. Krome li estis aktiva propagandanto de pacifismo. Profesie li estis oficisto de magistrato (enpensiiĝinta kiel magistrata direktoro). Post la dua mondmilito li sekvis la konsilon, donatan al pensiuloj, kaj transloĝiĝis el Praha en vilaĝon en apudlima regiono Údol sv. Kryštofa apud Liberec, kie li akceptis funkcion de delegito. Eĉ tiam li ne povis resti neaktiva. Mortis homo tre bona kaj tre laborema kaj homo modesta, kiu fosis sian sulkon, ĉiam afabla kaj ridetanta, kaj el kies sulko kreskis fruktoj, kiuj maturiĝis.

Kiam li estis sesdekjarulo ni volis publikigi en „Ligilo“ versaĵon de T. P. Fermo de nia oficejo kaj organo mal-ebligis tion. Por la sepdeka jaro ni jam ne povos uzi ĝin. Do aperu ĝi tie ĉi. Multaj ploros, sed versimile ĝi signifos konsolon por la filoj:

Avo Koutek, freŝe verda koro,
plena de esper' kaj Esperant'.
Sesdek jarojn tretas lia pland'
la terglobon — kun kaj sen humoro.

Oficisto, foje eĉ aktoro,
kavalir' de Zamenhof-ruband'.
Avo Koutek, freŝe verda koro,
plena de esper' kaj Esperant'.

Longajn jarojn estis li klub-motora,
nun atakas homojn per demand'
kiel ĉu-metoda instruant'.
„Cu jes? Cu ne?“ Jes, jes, ho sinjoro!

Avo Koutek, freŝe verda koro.

LIBROVENDEJO DE EAĈSR

povas tuj liveri la sekvantajn verkojn por la notitaj prezoj, al kiuj ni aldonos la efektivan afrankon. Inter krampoj ni notas paĝon de „Esperantista“ 1948, kie vi trovos detalojn pri la eldonaĵo.

	Kĉs
Šupichová, Kdo je L. L. Zamenhof (18)	6.—
„ Malá učebnice esperanta (88)	18.—
„ Hovoříme esperantsky	28.—
„ Esperanto, jeho vývoj a význam pro národní školu	6.—
Kilian, Esperanto. Učebnice a čítanka (88)	39.—
Quarello, Lernu Esperanton (99)	15.—
Filip, Velký slovník esp.-český (60)	200.—
Valaštan-Dolinský, Malý slovník esp.-slov. a slovensko-esp. (88)	60.—
Joels, Panoramo de nia movado (63)	15.—
Absolon, Moravia Karsto (72)	10.—
Esperantista poŝkalendaro 1949 (86)	30.—
Filip, Kantareto (69)	45.—
Fibich, Poem. Muziknotoj kun esp. teksto de la kanto	18.—
Novák, J. A. Komenský	2.50
Krátké uvedení do esperanta 100 ekz.	70.—
10 ekz.	8.—
Česká a slov. literatura v esperantu	2.—
Esperanto na pošt. cenninách	1.—
Collinson, Esperanto a jeho kritikové	2.—
Ankaŭ tuj liveriĉblaj:	
Glumarkoj de J. Dittrich 10 folioj po 20 gl. (79)	10.—
Aliaj glumarkoj 100 ekz.	35.—
Přehled esp. mluvnice en formato de duobla pk.	1.80
Poŝtkarto kun stelo 10 ekz.	2.—
Poŝtkarto kun Zamenhof (Bartošik) 10 ekz.	12.—
Poŝtkarto Novjara 10 ekz.	12.—
Gratulkarto Kristnaska k. Novjara, kun koverto 10 ekz.	15.—
Stacidoma tabulo (taŭga ankaŭ por kluboj ktp.)	100.—
Emajlita ŝildo ESPERANTO PAROLATA 14×5	32.—
Insiĝno: verda stelo sur blanka fono 8 mm	12.—
ĉeĥoslovaka flago kun verda stelo	25.—
Ni akceptas abonon por Internacia Kulturo 1949	100.—

La naskiĝtago de Zamenhof, la 15-a de Decembro, estis dum la kongreso en Danzig en 1927 proklamita **T a g o** de la libro. Oni aranĝis ĉiujare en multaj lokoj festojn kun celo, ke esperantistoj aĉetu dum la jaro almenaŭ unu libron esperantlingvan. Nun, kiam ofte estas pli da aĉetontoj ol da vendataj libroj, ni uzu la okazon de tiu ĉi datreveno, tiun ĉi jaron la 89-an, por rekomendi almenaŭ legi iun esperant-lingvan libron. Kaj ni turnu la atenton de la legontoj ankaŭ al la malnova literaturo, kiu estas por funda ellerno de la lingvo tre utila kaj rekomendinda. Kaj ni uzu tiun ĉi okazon por citi la vortojn de Waringhien pri signifo de la Zamenhof-traduko de Hamleto: „Hamleto de Sekspir“, kiun Zamenhof publikigis en la „Biblioteko de la Lingvo Internacia“, renkontis senkomparan sukceson kaj pli efikas por la propagando de la lingvo, ol ĉiuj plej lertaj teoriaj admonoj. Li pruvis la movon marŝante: certe la publikigo de Hamleto ludis gravan rolon en la batalo pri reformoj kaj multe helpis al la venko de konservativuloj. — Ĝi estis 71-a libro en Esperanto, aperis en 1894.



Esperantista poŝkalendaro 1949

jam aperis

Pli granda kaj pli riĉenhava ol la pasintjara!

La unua kaj unusola tiaspeca kalendaro esperantista en la mondo.

Liveras Librovendejo de EAĈSR por Kĉs 32.50 afrankite, Mendu tuj!

KORESPONDI DEZIRAS

16-jara gimnaziano Alinka Myszkowska, Radzimska 150, m. 9, **Warszawa**, dez. koresp. kun juna esp-isto, skolto-gimnaziano el ĈSR.

Voj. Kithier, konstrua teknikisto, Kolonia Vistra A 3/1, **Bratislava**, dez. koresp. kun ĉiuj landoj.

36-jara budhisma pastro Gahoo Takezaki, Toofukuji, Kaitokyoku-kunai, **Kumamoto-ken**, Japanujo, kun ĉs. esperantistoj.

19-jara studento kolegia Takajoŝi Hujimori, 115, Jchana, **Tomajaken**, Japanujo, kaj lia amikino

18-jara Nihoko Susaki (adreso: ĉe s-ro Takajoŝi Hujimori).

Jaroslav Bayer, konstrua teknikisto, Vistra kolonia E-6, **Bratislava**, kun ĉiuj landoj.

Poŝtstampojn (ne markojn) de internac. kongr. kaj konferencoj, speciale ankaŭ de Esperanto kaj de Ruĝa Kruco interŝ. E. Anderegg-Chevalley, **Horn am Bodensee**, Thurgau, Svislando.

Lernantoj de japana gimnazio (17—20 jaraj):

S-o Nagasu-Kazuiuki, s-o Hanatani-Ken, s-o Oonisi-Akira, s-o Huzimoto-Tosiaki, s-o Kitahara-Atuyuki, s-o Simizu-Tosio, s-o Yasuda-Takatuĝu, f-ino Uemura-Hisako, f-ino En'iti-Sadako, adreso: Abeno-Kōtōgakkō, Kitabake, Abeno-ku, **Oosaka-si**, Japanio, dez. koresp. kaj intŝ. pm., pk., gazetojn ktp.

Sugimoto-Hakaru, 30-jara gimnazio instruisto de matematiko kaj lingvo, Hademara-Motomati 5—578, Sakai-si, **Oosaka-hu**, Japanio, dez. koresp. pri socia scienco, nacia vivo, lingvo, eduko, matematiko ktp.

Skolŝta fako de E. K. Zlin, Prŝná 116, **Zlin** dez. koresp. pri ĉio.

32-jara profesoro deziras koresp. tutmonde per il. pk. aŭ letere pri diversaj temoj, Karel Patočka, **Litoměřice**.

Korespondi kun ĉeĥoslovakaj esperantistoj deziras la sekvantaj hungaraj samideanoj:

János Csillág, Sporttelep 49, **Allag**.

József Ócsai, Dagály-u. 13, **Budapest XIII**.

Grete Palkó, Alpár-u. 16, **Pestszenterzsebet**.

István Pálvolgyi, Sz. Imre Herceg-ú. 37, **Albertfalva**.

Jánosné Takács, Széchényi-u. 39, **Budakeszi**.

Mihályné Kővári, Verseny-u. 10. IV. 7, **Budapest VII**.

György Strak, Álmos-u. 54, **Kispest**.

Sándor Pap, Jókai-u. 40, **Kispest**.

Gizela Kuszerl (13-jara), Práter-u. 30, **Budapest VIII**.

István Fejszes, Mester-u. 5, **Budapest IX**.

Nelly Herczeg, Vig-u. 26, **Budapest VIII**.

Pri presindustrio dez. koresp. kun fakuloj Simon György, Kisfaludi-u. 25. I. 4, **Budapest VIII**.

Kuanchi-Li, 2 Hungren Li, (1) Kweivang Road, **Tientsin**, ĉina samideano, dez. intŝ. poŝtm. Preferas neuzitajn pm. de Protektorato en kompletaj serioj.

Koresp. kaj interŝ. pm. kun ĉs samideanoj deziras ankaŭ:

Hwa Lung Trading Co., Room 202, Yu Feng Building, Liao Ning Road, **Tientsin**.

Neitsun Chang, 261 Shansi Road, **Tientsin**.

Kontraŭ unu internacia respondkuponon ni sendas nian organon pri Budhismo. Societo por Orienta Kulturo, Venavägen 49, Oerebro, Svedlando.

Ĉu vi deziras internacian korespondadon? Ĉu interŝanĝadon de pm aŭ aliaj kolektaj? Ĉu vi volas aĉeti aŭ vendi komercaĵojn eksterlande? Por informoj turnu vin al I. K. S., 101, Z. W. Buitensingel, HAGO, Nederlando.

Kangurua letero estas nomataj ciklostilitaj dupaĝaj leteroj, sendataj de E. W. Chandler (57 Northcots St., Crow's Nest N. S. W. Aŭstralio) ĉiumonate kun celo prezenti Aŭstralion al la Mondo. Ĝi interese priskribas vidindaĵojn en la plej juna kontinento.

Internacia Kulturo

Kultura kaj socia revuo de ĉiuj demokratiaj esperantistoj en la mondo. Aperas ĉiumonate en 24-paĝaj grandaj kajeroj. Jara abono por 1949 estas 100 Kĉs, pagotaj al Librovendejo de EAĈSR.

Upozorņujeme...

Adresa: V Praze byly přečíslovány poštovní úřady. Naše adresa je proto nyní: **Praha XIX/7, pošt. příhrádka 7075.**

Objednávky předplatného zahraničních časopisů 1949, insertů v nich, objednávky knih, vydaných v cizině a příspěvky UEA pro 1949: Podaři-li se nám zdolatí dostatečně brzo překážky, které dosud stojí v cestě provádění těchto vašich objednávek, podáme zde včas zprávu. — Tato zpráva se netýká předplatného časopisu Internacia Kulturo (1949 — Kĉs 100.—). — Příspěvky UEA, došlé na rok 1948 a již v UEA nepřijaté, převedli bychom pak na rok 1949.

Slovníková příloha vyšla dosud jen do str. 72. Potíže s přidělem papíru trvají stále, doufáme však, že v dohledné době bude celý zbytek slovníku vytištěn a rozeslán najednou. Nové objednávky česko-esperantského slovníku ve formě přílohy za příplatek již nepřijímáme. Zájemce prosíme, aby vyčkali vydání v knižní úpravě.

Legitimace rozesíláme hromadně pravidelně do tří neděl po dojití platu na členský příspěvek. Prosíme nové členy, aby nereklamovali před touto dobou. Členům místních spolků jsou legitimace vydávány v místě.

Adresáře. Všeobecné adresáře nejsou po válce vydávány. Adresy delegátů UEA jsou uveřejněny každoročně v ročence UEA a adresy dopisovatelů a sběratelů v různých adresářích příležitostných (ku př.: Fr. Buhr, Praha-Břevnov, Bělohorská 187). Tyto adresy můžete též sledovat v esperantských časopisech.

Vydavatelský fond stále přijímá vypověditelné (nezúčtelné) podíly po Kĉs 100.— a násobku. I Vás prosíme, abyste tímto způsobem podporovali vydávání hodnotných překladů z ĉs. literatury.

Kancelář: Prosíme, abyste návštěvy omezili jen na případy, které nelze vyřídit jiným způsobem a jen v úředních hodinách (14—18). Úkoly spolupracovníků v kanceláři jsou rozsáhlé a nezbyvá jim čas na jednání bez konkrétního obsahu. Dobrovolní pracovníci jsou vždy vítáni. Děkujeme vám.

Prohlášení UNO. Část tiskopisů, přiložených k 8. číslu, se dosud nevrátila. Jsme přesvědčeni, že každý bez obtíží může získat alespoň ještě jeden podpis svého známého (pokud sám již dříve podepsal). Žádosti o další zásobu nedošel počet úměrný závažnosti akce. Tiskopisy můžeme dále dodat, upozorňujeme však, že akce končí 31. 12. 1948 a žádáme proto o navrácení nejpozději do 20. 12. 1948.



Z redakce a administrace. Končme tímto dvočíslem třetí ročník. Děkujeme členům, čtenářům i všem spolupracovníkům. Zmenšení přidělu papíru snažili jsme se kompenzovat větším rozsahem petitové sazby. Bohužel musili jsme též omezit beletrii, neboť stále rostoucí rozsah naší organizace vyžadoval také více místa v našem orgánu. Těšíme se, že se všemi členy a předplatiteli shledáme i v novém ročníku. Prvé číslo vyjde v polovici ledna.

K tomuto číslu přikládáme:

1. Složenku k zaplacení příspěvku na 1949. Vzhledem k omezenému přidělu papíru musíme již v prosinci stanovit náklad. Časopis můžeme zasílat jen členům, kteří obnovili členství zaplacením příspěvku 1949. Prosíme Vás, učiňte tak přiloženou složenkou. Pokud jste členy místních odboček nebo klubů, zaplaťte svému pokladníkovi tak, aby mohl příspěvky poslat hromadně ještě v prosinci.
2. Ústavu Československé republiky v esperantském překladu.
3. Jeden výtisk informačního věstníku Esperanto-Servo.

Tyto dvě přílohy jsou určeny pro Vaše zahraniční přátele. Další potřebné výtisky Vám zašleme zdarma na požádání. Rozešlete co nejhonněji. Kupon, vložený do Esperanto-Servo, necht' Vás zahraniční přítel vrátí na udanou adresu.

Přehled esperantských vysílání

Časové údaje jsou udány v normálním čase středoevropském.

Denně:

- 16.30—16.45 Praha 31.41 m a 1935 m. Zprávy a komentář.
18.15—18.30 Paříž 41.21 m. Program různého druhu.
22.00—22.15 Praha 49.92 m. Zprávy a komentář. V neděli pásmo.

Pondělí:

- 22.50—23.00 Praha I. 470.2 m. Přednášky a jiný pořad.
23.00—23.30 Verda Stacio Praha (II.) 269.5 m, 325.4 m, 259.1 m a 219.6 m. (Pouze prvé pondělí v měsíci.) Umělecké pořady.

Úterý:

- 00.30—00.35 Budapešť 549.5 m. Zprávy.
18.55—19.00 Schwarzenburg (Bern) 25.61 a 48.66 m. O Švýcarsku (Dr Bauer).
19.50—20.00 Sofia 32.9 m.
21.45—22.00 Hradec Králové 238 m. O esperant. hnutí. (Nevysílá prvé úterý v měsíci.)
23.00—23.10 Ostrava 259.1 m. (Nevysílá prvé úterý v měsíci.)

Středa:

- 6.45—7.00 Mnichov 48.70 a 405 m. Kurs esperanta. Každou druhou středu (3.11, 17.11, atd.).
11.15—11.35 Paříž 431.5 m. Kurs.
21.10—21.25 Varšava 48.25 m.

Čtvrtek:

- 00.30—00.35 Budapešť 549.5 m. Zprávy.
18.45—19.00 Vídeň II 41.81 a 228.6 m. Kurs a zprávy.
18.50—19.00 (tytéž vlny). Zprávy o Rakousku v esperantu.
18.55—19.00 Schwarzenburg (Bern) 25.61 a 48.66 m. O federalismu a míru. (Univ. prof. Dr E. Privat.)
22.50—23.00 Praha I 470.2 m. „Týden v CSR.“
23.00—23.10 Ostrava 259.1 m.

Pátek:

- 19.50—20.00 Sofia 32.9 m.

Sobota:

- 00.30—00.35 Budapešť 549.5 m. Zprávy.
14.00—14.15 Mnichov 48.70 a 405 m. Kurs esperanta. (Každou druhou sobotu).

Adresy pro zaslání poslechového hlášení (Nutno psáti každé stanici zvláště):

Československý rozhlas, esperantský odbor, Praha XII, Stalinova 12. (O programu Prahy I. a krátkovlnného vysílání.)

Verda Stacio, Československý rozhlas, Praha XII, Stalinova 12.

RAVAG, Argentinierstr., Wien IV, Rakousko.

Radio Sofia, Sofia, Bulharsko.

Československý rozhlas, stanice Ostrava, Ostrava, Bráfova 5.

Východočeský vysílač, Hradec Králové.

Radiodiffusion Française, Emissions Espérantistes vers l'étranger, 118 Champs-Élysées, Paris 8.

Radio München, Kulturabteilung, Rundfunkplatz 1, München, Německo.

Hungara Radio, Budapest, Maďarsko.

Pola Radio, Koszykowa 8, Warszawa, Polsko.

Schweizer Kurzwellendienst, Bern, Švýcarsko.

J. M.

DIVIDO DE LA FUNKCIOJ DE LA ASOCIA KOMITATO.

Al membroj elektitaj de la kongreso aliĝis 4 anoj delegitaj de la E. K. en Praha (M. Baldová, A. Barochová, A. Fryšová, V. Lorenz; Fr. Landsmann), unu ano de E. K. en Brno (J. Kořínek) kaj 5 anoj de Slovaka Esperantista Societo (Dr L'. Izák, P. Rosa, E. V. Tvarožek, Ing. St. Veselý, K. Kiss).

La komitato dividis al si funkciojn kaj renoviĝis direktadon de la komisionoj. Rezultas suba listo:

Prezidanto:

Adolf Malík, Praha XI., Kalininova 5.

Vicprezidanto:

Dr Stan. Kamarýt, Chotěboř 853.

Vicprezidanto:

Rudolf Hromada, Praha XIX/7, Sochařská 2.

Gen. sekretario:

Jaroslav Mařík, Praha II, Krakovská 20.

Sekretario:

Jan Valeš, Praha II, Na Poříčí 42.

Kasisto:

Hedva Nováková, Praha II, Na Slupi 17.

Librotenisto:

Jiří Hromada, Praha XIX/7, Sochařská 2.

Komitatoj:

Marie Baldová, Praha II, Malá Štěpánská 7.

Anna Bárochová, Praha II, Sokolská 17.

Anton Bolek, Košice, Stará baštová 3.

Anna Fryšová, Praha XIII, Brožíkova 19.

MUDr L'udovít Izák, Turč. Sv. Martin.

Vlado Jukl, Bratislava, Ul. 4. apríla 1.

Jiří Kořínek, Brno 14, Drt'inova 46.

Ing. Lad. Krajic, Čes. Budějovice, Žižkova 42.

Václav Lorenz, Praha XII, Lublaňská 32.

Pavol Rosa, Bratislava, Štefánikova 1.

Antonín Slanina, Praha XVI, Nádražní 13.

Alois Šikl, Praha XII, Přiční 11.

E. V. Tvarožek, Turč. Sv. Martin, Kuzmányho 29.

Josef Vondroušek, Brno, U botanické zahrady 31.

Vickomitatoj:

Vlast. Blažek, Olomouc, Dvořákova 36.

Frant. Kavan, Plzeň II, Alšova 2.

Theodor Kilian, Třebíč, Přičná 318.

Koloman Kise, Bratislava.

Frant. Landsmann, Praha XII, Bělehradská 44.

Frant. Pytloun, Hradec Králové, Zamenhofova 1010.

Vlad. Slaný, Ostrava XI, Kutuzovova 29.

Karel Šolc, Mladá Boleslav, Železná 41.

Ing. Štefan Veselý, Turč. Sv. Martin, Kuzmányho 37.

Kontrola Komisiono:

Frant. Buhr, Praha XVIII, Bělohorská 187.

B. Řeháčková, Praha XI, Tomkova 25.

Václav Špür, Doksy, Městská spořitelna.

Vicmembroj de K. K.:

Václav Král, Praha XIII, Smetanova 14.

Jar. Míčová, Praha XVIII, Na Vořechovce 42.

Komisionoj:

Gazeto: Redakto Dr Stan. Kamarýt, Rudolf Hromada, Ota Ginz, Administrato T. Balda.

Librovendejo: Ota Ginz, Praha II, Stárkova 4.

Radio: Ad. Malik, Rud. Hromada, J. Mařík, A. Slanina.

Radio en Ostrava: Vlad. Slaný, Zdeněk Raška.

Lingvaj aferoj: Dr Aug. Pitlik, Praha II, Křemencová 17.

Literaturo: Dr Tomáš Pumpr, Praha XIX, Verdunská 8.

Lernejoj: Theodor Kilian.

Ekzamenoj: Dr Stan. Kamarýt, Dr T. Pumpr.

Sciencaj aferoj: RNC Jar. Hanuš, Kladno 1997.

Skoltoj: Stan. Lešinger, Praha, Pankrác, Libušina 34.

Gazetara servo: J. Kořínek.

Ĝakistoj: Dr Václav Faigl, Zlonice, nám. 6.

UEA-peranto: Skribu al la adreso de nia Asocio.

Adreso: Esperanto-Asocio en ĈSR, Praha XIX/7, p. schr. 7075.

Oficejo: Praha II, Malá Štěpánská 7, malfermita ĉiutage 14—18 hod., sabaton 8—12 hod.

Na jednotlivé funkcionáře obraĉejte se výhradně pod adresou Svazu, Praha XIX/7-7075.

Vychází měsíčně (10krát do roka). Majitel, vydavatel a nakladatel Svaz esperantistů CSR v Praze XIX/7, p. příhr. 7075. Odpovědný zá-
stupce listu Dr Stan. Kamarýt. Ročně 70 Kčs s členstvím. Bez členství 80 Kčs. Účet pošt. spoř. 9.602. Tiskne »Cil« v Karl. Varech. Účast
na poštovní novinové službě povolena řed. pošt. v Praze č. j. IA-Gre-2372 OB-48. Dohledací poštovní úřad Praha 25.